

ESPERANTO

JANUARO 1964

57 a Jaro - N-ro 698 (1)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 1 Antaŭen kun kredo (Yagi)
La serĉo por nova idealo (H.T.)
- 2 Kelkaj kaŭzoj de nekontentiga progresado
(Lapenna)
- 5 Komunikado de la Estraro
Nova grava akiro por la Biblioteko
- 6 Leteroj
- 7 Moderna nederlanda arkitekturo (Hekker)
- 10 Recenzoj
- 12 Ricevitaj eldonaĵoj
- 13 Mallongaj novaĵoj
- 14 49-a Universala Kongreso, Hago, 1964
50-a Universala Kongreso, Tokio, 1965
- 15 La Juna Vivo
- 16 Radio
Memoriga Kalendaro
- 17 Esperantista Vivo
Oficiala Informilo
- 18 Internaciaj Konkursoj 1963
- 19 La poŝtmarkkolektado

kovrilo

Ilustraĵo el "Malnovaj legendoj nove redaktitaj" en la *Noveloj de Lusin* (vidu p. 11)

fotoj

- 7 N. Jesse
- 9 centro: J. Versnel
aliaj: De Nederlanden van 1845

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPE-
RANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando. Telefono: (010) 3 27 88.
Girkonto 378964.

TELEGRAMADRESO:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesita, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Jara abono (1964): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri kongresoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odýnca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, Kystvej 10, 2 th., Aabenraa, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

esperanto
januaro
1964

Antaŭen kun kredo

Feliĉan Novan Jaron al vi, karaj legantoj! Mi kore salutas vin kaj deziras al vi bonan sanon. Dum tiu ĉi jaro 1964 ni laboru kune kaj marŝu larĝpaŝe antaŭen kun kredo por puŝi nian movadon!

Laŭ raporto de la Komitata Kunveno en Sofio vi scias, ke UEA penis plenumadi sian 2-an laborplanon dum la pasintaj jaroj kaj dank' al kunhelpo de tutmondaj Esperantistoj ĝi povis akiri pli kreskintan nombron de individuaj membroj, havi pli multajn gazetojn kaj eldoni bonajn literaturaĵojn, precipe la serion *Oriento-Okcidento*. Estas notinda fakto, ke la nombro de lernejoj instruantaj Esperanton ankaŭ kreskis multe en la pasinta jaro kaj la movado de junularo fariĝis tre vigla. Entute Esperanto progresadis rimarkinde en mallonga tempo. La Sofia Universala Kongreso registris pli ol 3,400 anojn — nombro vere ĝojinda kiel la dua plej granda en la historio de Universala Kongresoj de Esperanto. Mi ĉeestis tie kaj sentis per mia haŭto la atmosferon de aktiva, vivoplena kaj agema laboro en ĉiuj fakaj kunvenoj.

Nu, en tiu ĉi jaro ni havu en Hago ankaŭ same fruktodonan Kongreson! Nia Universala Kongreso estas bona manifestacio al la ekstera mondo pri ekzisto kaj agado de Esperanto, la sola lingvo internacia vivanta!

Post unu jaro en 1965 oni anticipas en Tokio amikan kaj brilan Universalan Kongreson, en ĉefurbo de Japanujo, kie ĉiulandaj Esperantistoj unuafoje kunsidos por pruvi homaman idealon de Zamenhof. Ĝi fariĝos ankaŭ granda manifestacio de Esperanto ne nur al Aziaj popoloj sed ankaŭ al la tuta mondo.

La serĉo por nova idealo

En ĉiuj partoj de la mondo kie troviĝas anoj de TEJO, la monatoj decembro kaj januaro kiujn ni nun trapasas estas periodo de aprezado kaj planado — aprezado de la atingoj kaj mankoj de la ĵuspasinta Jaro de la Junularo, kaj planado de la metodoj laŭ kiuj TEJO fortikigos la propran organizon kaj firmigos siajn lastatempajn atingojn.

La anoj de TEJO tute senhonte fieras pri la kelkrilate mirakla sukceso de sia kampanjo de 1963. Ĉiuj punktoj de la plano por la Jaro de la Junularo estas aŭ jam plenumitaj aŭ survoje al plenumiĝo. El kvazaŭ regiona organizo kun ok naciaj sekcioj, TEJO burĝonis dum 1962/3 en organizon tute internacian kun dek ses naciaj sekcioj. Samtempe ĝia membro-nombro altiĝis ĝis ne multe malpli ol dek mil, kaj ĝia influo etendiĝis tra du pliaj kontinentoj.

Sed ne nur tio... Dum 1963 la tuta organiza strukturo de TEJO, precipe rilate ties kunligon kun UEA, profunde ŝanĝiĝis. Por la unua fojo,

En laboro Esperanta ni ne forgesu *amikecon al kunlaborantoj*, sed ĉiam havu fratecon kaj estimon! Japana proverbo diras: unu sago estas facile rompebla, sed tri kunigitaj fariĝas nerompeblaj. Ĉiam kunigite, mano en mano, ni akiru firman bazon por progresigi Esperantan movadon en venontaj jaroj. Antaŭen kun kredo! Per la laboro kunigita ni atingos nian

ĉefartikoloj



Antaŭenrigardo al 1965: japanstila gastejo en Kioto

celon. Grabowski iam kantis al ni: "En ĉiu mondparto, en ĉiu ter-zon'. En koroj de centoj da miloj. Jam vibras por nia saluto reson'."

Prof. D-ro Hideo Yagi
Prezidanto de UEA

TEJO estas vere akceptita kaj integra parto de la organiza aparato de UEA; ĝi nun havas sian propran organon — luksa junulara revuo tute en Esperanto; ĝi aktive kunlaboras kun UEA kaj CED en pluraj kampoj. Kaj ĝia kongreso en Vraca en 1963 estis la plej granda en la historio de TEJO kaj verŝajne en la tuta historio de la Esperantista junulara movado.

Cion ĉi TEJO atingis per tri rimedoj: per la helpo de UEA, per la helpo de la Esperantista publiko, kaj per la propraj rimedoj kaj fortoj. Unu sen la aliaj senvalorus kaj kondukus nur al malsukceso. La entuziasma reago de la tuta esperantistaro al la Jaro de la Junularo — reago kiu portis al ni amason da financaj kontribuoj, multajn novajn legantojn de nia gazeto KONTAKTO, kaj kiu verŝajne portos ankaŭ estontece — tiu reago montras profundan ŝanĝon en la starpunkto de la esperantistoj. Hodiaŭ estas pli da junaj geesperantistoj en la Movado ol verŝajne iam ajn antaŭe: ju pli ni aĝiĝas, des pli la Movado juniĝas. Jen vere subteninda paradokso!

H. T.

esperanto
januaro
1964



Kelkaj kaŭzoj de nekontentiga progresado

En Sofio aparta komisiono de la Komitato pritraktis la atingojn de U.E.A. en la pasinta laborjaro kompare kun la taskoj de la Dua Baza Laborplano, akceptita en 1962 en Kopenhago. La komisiono konstatis, ke la Asocio "ĝenerale agas en la senco de la Laborplano", sed ke ankoraŭ ne estas sufiĉe farite por la realigo de kelkaj eroj. Ĝia ĉefa rimarko estis, ke la membronombro ne montras tendencan al konsiderinda plialtiĝo.

Post vasta diskuto pri tiu punkto, la Komitato elektis tripersonan komisionon (komitatanoj J. Guillaume, V. Oljanov kaj A. Sekelj) kaj komisiis ĝin esplori la demandon per skriba interrilatado. Supozeble la komisiono jam eklaboris kaj espereble ĝi povos prezenti siajn konkludojn kaj utilajn sugestojn al la Komitato en Hago.

Intertempe, ŝajnas oportune tuŝi jam nun, komence de la Nova Jaro, kelkajn aktualajn aspektojn de la tuta laboro de la organizita neŭtrala Esperanto-Movado. Tio povos helpi la komisionon direkti sian atenton al la ĉefaj neŭralgiaj lokoj kaj, sekve, trovi ĝustajn solvojn. Tio, eble, ankaŭ kontribuos al pli bona ĝenerala komprenado de tiuj kaŭzoj, kiuj fakte obstaklas pli kontentigan progresadon. Se, kutime, kompreni signifas duone pardoni, en nia kazo ĝi devus signifi: forigi, almenaŭ duone, la radikojn de la malbono.

Pozitivaj kaj Negativaj Faktoroj

Klopodo atingi kiun ajn celon estas kondiĉita de la rilato inter la pozitiva agado, inkluzive kelkfoje necesan pasivecon, kaj la negativaj elementoj, inkluzive ofte superfluaĵojn mispaŝojn, kiuj malpliigas, paralizas aŭ eĉ detruas la efikon de la pozitiva flanko. Ju pli grava kaj kompleksa estas la celo — kaj en nia kazo ĝi ja estas tia — des pli multnombraj estas la pozitivaj kaj negativaj faktoroj, kiuj decide influas la finan rezulton. Estas absolute klare, ke en tia situacio la realigo de la celo dependas ne nur de multflanka, lerta, trafa pozitiva agado, sed ankaŭ de la kvanto kaj speco de negativaj kontraŭagoj. Se la du grupoj de faktoroj estas pli-malpli en ekvilibro, la afero stagnas; se la pozitivaj plipezas, oni progresas pli aŭ malpli kontentige; sed se la negativaj abunde superpezas, regreso estas neevitebla.

Ĉiu agado okazas en difinitaj sociaj cirkonstancoj, kiuj povas esti plene aŭ parte favoraj aŭ malfavoraj. La du esencaj premisoj, kiuj faciligas la agadon por la ĝeneraligo de la

uzo de la Internacia Lingvo en la internaciaj rilatoj, estas la daŭre komplikiĝanta lingva problemo en la mondo kaj la maksimuma perfekteco de Esperanto, kiu tial objekte prezentigas kiel la sola ĝusta solvo. Aliflanke troviĝas tuta aro da ĉiaspecaj malfacilaĵoj: de superstiĉoj kaj antaŭjuĝoj, tra la problemoj de internaciaj transpagoj, ĝis politikaj streĉitecoj, rasismoj kaj ŝovinismoj rekte malamikaj al ideo mem de komuna, neŭtrale homa Internacia Lingvo.

La tasko de la Esperanto-Movado organizita en U.E.A. certe ne estas ŝanĝi la mondon, sed efike disvastigi la lingvon en la konkretaj cirkonstancoj, en kiuj vivas la hodiaŭa mondo, ekspluatante kiel eble plej racie la disponeblajn fortojn. Tio, kompreneble, neniel signifas, ke la ĉiam pli ampleksa praktikado de la Internacia Lingvo ne kontribuas al la rapidigo de la integriĝa procezo de la homaro. Tute male, ĝi estas unu el la bazaj antaŭkondiĉoj por la atingo kaj posta konservo de unueco sur pli alta ŝtupo, sed tiu demando troviĝas ekster la kadro de la nuna pritrakto.

Estas bone konate, ke en la lasta jardeko U.E.A. duobligis la nombron de siaj membroj. Tre verŝajne ankaŭ fine de 1963 montriĝos kresko kompare kun 1962. Tamen, la celo de la Laborplano en tiu rilato — 15.000 individuaj membroj kaj 35.000 asociaj — estas ankoraŭ malproksima. La demando nun estas ĉu oni povis atingi pli multe ne sole rilate la membronombro, sed ĝenerale, en ĉiuj eroj de tiu ampleksa programo de laboro, ĉar finfine la nombro de la membroj, same kiel ĉiu alia punkto, estas dependa de la tuto, kaj la plenumo de la tuto baziĝas sur la realigo de ĉiu unuopa parto. Se fakte estas eble antaŭeniri pli rapide en la nunaj eksteraj kondiĉoj, pri kio apenaŭ povas ekzisti ia dubo, kie, do, troviĝas la veraj kaŭzoj de la nekontentiga progresado: ĉu en la foresto de pozitivaj elementoj, aŭ en la troa pezo de la negativaj?

Demokrateco kaj Disciplino

Demokrateco, interalie, inkluzivas egalecon de la konsistaj unuoj, ĝeneralan akcepton de difinitaj bazaj reguloj de konduto devigaj por ĉiuj, liberan opiniesprimadon pri diskutataj demandoj kaj observadon de decidoj, formitaj laŭ la principo de plimulto. Ĉiu el tiuj ideoj estas sintezo de nombro da rajtoj kaj devoj. Al la rajtoj je egaleco, ekzemple, respondas la adekvata devo respekti la egalecon de la

aliaj; aŭ: al la rajtoj partopreni en debatoj kaj decidoj respondas la devo rekoni la samajn rajtojn al aliaj kaj disciplinite observi la decidojn de la plimulto.

Ce ni la principo de demokrateco, sur kiu baziĝas U.E.A. kaj ĉiuj niaj organizaĵoj, aperas multfoje plene deformita. Tro oftaj estas la tendencoj emfazi la rajtojn kaj forgesi la devoj. Kelkfoje jam okazis, ke eĉ eksplicite oni provis diversmaniere pravigi tian sintecon, ĉefe per misapliko al si mem de la koncepto de suvereneco, kiu, efektive, se la vortoj ankoraŭ konservas sian kutiman sencon, estas neniel aplikebla al kiu ajn nia organizaĵo. Ĉiu organiziĝo — eĉ tiuj de ŝtatoj, kiuj ja estas suverenaj — necese signifas partan limigon de absoluta agadlibereco en la intereso de tiuj komunaj celoj, pro kiuj oni organiziĝis, kaj sekve libervolan akcepton de difinita interna disciplino. Sen tiu interna disciplino demokrateco tutsimple ne povas funkcii: ĝi transformiĝas en anarkion, en kiu ĉiu agas laŭ siaj bontrovo kaj kapricoj en ĉiujn eblajn direktojn kun la fina rezulto, ke la tuto estas paralizita.

Konkrete: se ankoraŭ troviĝas unuopuloj, eĉ en gvidaj pozicioj de niaj organizaĵoj, kiuj neas la devigan karakteron de la Statuto kaj Regularoj de U.E.A., kaj de la decidoj faritaj laŭ tiuj bazaj dokumentoj, inkluzive la Laborplanon, tiam evidente U.E.A. ne povas multon pli atingi. Kiamaniere U.E.A. — nome ni ĉiuj, kiuj formas ĝin — povas realigi la ĉefan celon de la Laborplano kaj ĉiujn taskojn, kiuj kondukas al tiu celo, se nur la centraj organoj de la Asocio klopodas plenumi sian devon, dum la plimulto de la landaj kaj fakaj asocioj, de la lokaj grupoj kaj individuaj membroj restas tiurilate pasivaj? La realigado de la Laborplano estas afero de ni ĉiuj kaj tial ĝia plenumo dependas de celtrafa agado en ĉiuj branĉoj kaj sur ĉiuj niveloj: monda, faka, landa kaj loka.

Ne estas eble, ekzemple, altigi konsiderinde la membronombro de U.E.A., se samtempe ne kreskas la nombro de la membroj en la bazaj kaj mezaj organizaĵoj, aŭ se oni ne aligas ilin al U.E.A. kaj ne varbas plej insiste kiel eble plej multajn individuajn membrojn, precipe en la kategorio M.A. Kaj plue, se la membronombro ne kreskas kontentige, aro da aliaj taskoj ne estas plenumeblo, ĉar tutsimple mankas la necesa antaŭkondiĉo.

Alia ekzemplo: ne estas eble plibonigi la informadon pri la Internacia Lingvo, se oni plue ignoras la Principaron de Frostavallen, formulitan post profunda debato inter la plej elstaraj agantoj sur tiu kampo. Certe, jam formiĝis pluraj landaj informaj fakoj kun lokaj kunlaborantoj. Kelkaj eĉ laboras tre bone, konforme al la principoj akceptitaj en Frostavallen, kaj daŭre atingas rimarkindajn rezultojn, sed ilia nombro kompare kun la tuto estas vere ankoraŭ tro sensignifa por doni la deziratan efikon en mondaj kadroj.

Plia ekzemplo: por kunmeti la statistikon pri la lernejoj, en kiuj Esperanto estis instruata en 1962/1963, CED devis fari multajn alvokojn en niaj gazetoj, sendi plurajn cirkulerojn, peti

informojn kaj urĝigadi la respondojn per amaso da individuaj korespondaĵoj. Fine, en la lasta momento, estis eble kunmeti la statistikan trarigardon, kiu servis kiel unu el la bazaj dokumentoj por la Beograda Lerneja Konferenco. Malgraŭ tiu grandega fortostreĉo kaj tempoperdo, la statistiko tamen ne estas komplete. Kial? Ĉar multaj niaj geinstruistoj, kiuj tiel sindone instruas la lingvon en la lernejoj, ne trovis kelkajn pliajn minutojn por plenigi la demandaron sur jam presadresita poŝtkarto, aŭ kredeble tial, ĉar ili eĉ ne rimarkis, ke la enketo okazas.

Aliaj manifestiĝoj de tiu esence sama kaŭzo estas la amaso da nenecesaj sinturnoj pro bagatelaĵoj al la centraj organoj de la Asocio, kio sufokas la laboron; neutiligo de taŭgaj informaj kaj dokumentaj materialoj publikigitaj de U.E.A. kaj CED; nekompetentaj enmiksiĝoj en bone funkciajn servojn kaj paralela malobservado de la propraj taskoj; longaj diskutoj pri malgravaĵoj kaj sekve perdo de perspektivoj kaj proporcioj; konstanta restarigado en niaj diversaj organoj de la samaj demandoj jam multfoje solvitaj.

Tiaj kaj similaj ekzemploj abundas ĉiuloke kaj ĉiutage. Multe pli ol oni povus imagi. Manko de organiza disciplino kaj individua memdisciplino formordas la plej bonajn partojn de pene kultivitaj fruktoj. Tio efikas negative ne nur je difinita unuopa agado, sed je la tuta laboro. Energion kaj tempon superflue perditajn oni estus povintaj utiligi sur aliaj kampoj por plenumo de aliaj taskoj. La tago, tamen, havas nur 24 horojn kaj ankaŭ la homaj fortoj ne estas neelĉerpeblaj. Kaj se ili estas neracie malŝparataj por flankaj, restas nenio aŭ nur tro malmulte por la ĉefaĵoj. Tial, precize tial, povis okazi, ke unuarangaj atingoj aŭ eventoj, kiaj la Rezolucio de UNESKO de 1954 aŭ la Zamenhof-Jaro en 1959, kiuj kreis aparte favorajn kondiĉojn por sukcesplena agado ĉie en la mondo, kaj konsiderinda nombro da malpli gravaj, kiaj la Scienca Konferenco en 1962 aŭ la Lerneja Konferenco en 1963, restis praktike, kompare kun la eblecoj, preskaŭ komplete neekspluatitaj. Iom pli da interna disciplino helpus eviti similajn erarojn en la estonteco kaj plibonigi ĉion.

Materiaj Rimedoj kaj Homaj Valoroj

Por antaŭenigi kiun ajn aferon estas bezonataj materiaj rimedoj kaj homaj fortoj. Ju pli iu ideo — en la plej larĝa senco de tiu esprimo — estas konsiderata kiel socie grava, utila aŭ necesa, des pli facile estas troveblaj la sumoj por ĝin realigi kaj tio aŭtomate solvas ankaŭ la demandon de la homa faktoro. Grandegaj kapitaloj en plej diversaj formoj de regulaj buĝetaj elspezoj, havaĵoj, subvencioj, helpoj k.s. estas hodiaŭ ĉie disponigataj de la ŝtatoj, privataj fondaĵoj aŭ interŝtataj organizaĵoj kaj institucioj por ĉiaspecaj esploroj, edukado, scienco, ĝenerale por progresigo de la kulturo kaj civilizacio. Tutaj armeoj da kompetentaj specialistoj, adekvate salajrataj, laboras sur tiuj kampoj.

La solvo por kiu ni pledas, kvankam racia

**kelkaj
kaŭzoj de
nekontentiga
progresado**

kaj tial ĉiam pli impete altrudiĝanta, tamen ankoraŭ ne akiris tiel popularan pozicion, ke ĝi ricevus kian ajn pli signifan financan apogon de kiu ajn flanko. La materia bazo de nia laboro plue konsistas ĉefe el rimedoj, kiujn ni mem havigas al niaj organizaĵoj, unuavice el kotizoj kaj abonoj, sed ankaŭ el donacoj por difinitaj celoj.

Kompare kun la unuaj jaroj de la kvindekaj ankaŭ tiurilate la situacio multe pliboniĝis. En 1955, ekzemple, kiam U.E.A. fine ŝanĝis sian Statuton kaj translokgis la sidejon al Rotterdam, la kaso estis tiel komplete malplena jam en septembro, ke ne estis mono eĉ por afrankoj. Necesas ĝin foje diri, kaj diri tion tre klare, ke sole dank' al helpemo de brita esperantista paro, kiu tiam grandanime pruntis kelkcent da pundoj, estis eble kovri la elementajn elspezojn kaj venki la krizon. Hodiaŭ U.E.A. estas en propra ampleksa domo kun moderne ekipita oficejo kaj, kvankam ankoraŭ necesas tre ŝpari kaj ofte rezigni pri iu agado pro manko de financaj rimedoj, certe oni ne plu frontas la problemon de kie pagi salajrojn kaj fakturojn! Estontece, espereble, la situacio estos eĉ pli kontentiga.

Restas, tamen, la fakto, ke nuntempe la financaj rimedoj de U.E.A. kaj de la tuta Esperanto-Movado estas ankoraŭ terure malgrandaj. Se nur ili estus la decida faktoro, preskaŭ nenio estus atingita, nek atingebla en la estonteco. Feliĉe, la foreston de oro abunde kompensas la homa faktoro. Senfina idealismo nutrita de firma konvinko faris verajn miraklojn malgraŭ la pli ol neadekvataj materiaj rimedoj. Sen troigo oni povas diri, ke por atingi ion similan laŭ la kutimaj laborkondiĉoj kaj profesiaj salajroj, oni estus devinta elspezi milionojn da pundoj ekde 1887 ĝis hodiaŭ. Ni ne havis kaj ne havas ilin. Kaj tio signifas, ke la laboro de tiuj niaj homoj, kiuj kun talento kaj diligento agas en diversaj lokoj kaj funkcioj por la disvastigo kaj evoluigo de la Internacia Lingvo, estas kaj restas nia plej granda, ne anstataŭigebla valoro. Ĝi konservas tiun karakteron eĉ se la materia bazo plurobligos kaj tiel ebligos paralelan multoblan vastigon de la agadsfero, ĉar en movado batalanta — kaj nia necese restos tia ĝis la atingo de la celo — nenia burokrata aparato, eĉ ne la plej perfekta, povas ludi la saman rolon.

Ni ŝparas ĉiun moneron. Ni atente kontrolas niajn financajn raportojn kaj poste senfine diskutas ilin en niaj ĉefkunvenoj. Bone. Tio estas en ordo, kvankam iom pli mallongaj diskutoj, kiuj en ĉiu okazo neniel povas transformi pencon en pundon, lasus pli da tempo por pozitivaj agadoj. Sed ĉu oni rilatas kun la samaj atentemo kaj respekto al niaj homaj valoroj?

Ĝenerale jes, sed ofte, tro ofte ne. Kaj temas ĝuste pri tiu malfeliĉa "tro ofte". Tri, kvar lastatempaj kazoj helpas ilustrati la situacion. En la unua, senĉesaj implikaĵoj, molestadoj, ĉiaspecaj internaj malhelpoj al kiu ajn entreprenita laboro tiel lacigis tre kleran kaj energian

personon, kiu okupis plurajn gvidajn poziciojn en la Movado, ke li finfine forlasis ĉion, eĉ en tiuj medioj, kie li ĝuis sinceran apogon. En alia kazo oni tutsimple eksigis sindonan junulon, kiu perfekte organizis la informadon en sia lando kaj dediĉis al tiu laboro kaj al kelkaj aliaj sian tutan liberan tempon, kun la rezulto, ke tiu branĉo nun apenaŭ vivetas. Talentan junan organizanton de unuarangaj kulturaj aranĝoj, kiu sur sia dorso portis la ĉefan ŝargon de antaŭpreparoj kaj prizorgo de ĉiuj detaloj, inkluzive eĉ personan pakadon de amaso da materialoj por ekspozicio, oni publike nomis "diktatoro". Kiam alia klarvida esperantisto sukcesis per granda fortostreĉo revigligi formortontan, sed iam gravegan, lokan grupon, ankaŭ lin oni proklamis "diktatoro", kio igis lin rezigni pri sia funkcio kaj lasi ke la grupo praktike malaperu. Kvar ekzemploj el kvar landoj. La fenomeno ne havas nacian karakteron. Ĝi estas bedaŭrinde sufiĉe ĝenerala.

Pretere dirite, la esprimo "diktatoro" estis jam tiom da fojoj aplikita al niaj plej sukcesaj aktivuloj, ke efektive ĝi tute perdis sian originalan signifon kaj iusence fariĝis honora titolo, indikanta al ĉiu konanto de nia realaĵo preskaŭ senerare personon, kies inteligentan kaj paciencon konstruadon kutime kronas objektivaj atingoj. Plue, interesa, sufiĉe ofta, specife nia metamorfozo: se iu sciencisto, artisto, granda industriisto aŭ kiu ajn alia iom pli grava persono, kiu tamen ne scias la Internacian Lingvon, okaze deklaras, ke Esperanto estas saĝa kaj apoginda afero, parto de niaj gazetoj tuj tion notas per dikaj literoj kaj iuj eĉ alvokas "sendi amase dankleterojn"; se persono kun la samaj kvalifikoj ellernas la lingvon, li fariĝas sensignifa; se li iomete eklaboras, ĉirkaŭ li komencas plektiĝi mildaj kritikoj; sed se li energie dediĉos siajn fortojn al akiro de iu nova pozicio por la lingvo aŭ al kreo de iu daŭra valoro en ĝi, tiam tute certe, pli aŭ malpli frue, troviĝos iuj — eble eĉ la samaj alvokintoj al "amasa sendado de dankleteroj" — kiuj starigos sur la vojo de la nova "diktatoro" tiom da obstakloj kaj kaptiloj ĝis li fine falos. Simptomo de nesufiĉa respektado de la laboro farata por Esperanto estas ankaŭ tiu fama "li estas nur salajrata oficisto", eldirita kun forta nuanco de malŝato, kvazaŭ la plimulto de tiuj niaj esperantistoj-oficistoj, kiam ni povas havi ilin, ne dediĉus al Esperanto ankaŭ grandegan parton de sia libera tempo kaj kvazaŭ tiu okupo estus la plej malesliminda profesio en la mondo.

Tute flankelasanten en tiu ĉi kunteksto la grandajn maljustajn kampanjojn, kies viktimoj estis pluraj mondkonataj laborantoj por la Internacia Lingvo, inkluzive unuavice D-ron Zamenhof mem, tiaj etmensaj envioj kaj senrespondecaj subfosadoj, pikadoj, senspritaĵoj "spritaĵoj" kaj ofendoj forigis el niaj vicoj altvalorajn pozitivajn elementojn kaj senkuraĝigis multajn aliajn brilajn cerbojn entrepreni ion ajn pli grandskalan. Movado, kiu vundas siajn plej bonajn kaj kapablajn membrojn, fakte detruas sin mem. Nur personoj plene konsciaj pri la grandeco de la afero

super ĉiuj nanaĵoj kaj, krome, havantaj sufiĉe da fizikaj fortoj kaj intelekta kuraĝo, povas tion elteni. Ke tiaj ne abundas, ne estas surprize.

La laboro por Esperanto donas nek gloron nek honoron. Ankoraŭ ne. Almenaŭ ne en la ekstera mondo. Kaj interne de la Movado neniu vere saĝa kaj sincera laboranto ilin pretendas. Kion oni rajtas postuli pli ol prave, estas tiu elementa respekto, kiun ĉiu ordinara homo ĝuas en civilizita socio kaj kiun li des pli prave devus havi en kultura movado. Kaj tio ĉe ni bedaŭrinde ankoraŭ forestas en multaj kazoj, kio, tute senkonsidere al la pure persona momento, danĝere malhelpas la progresadon. Laboro sub premo de afliktita koro kvalite neniam egalas al tiu farata kun ĝojo kaj plezuro, nek ĝi povas esti inspira por aliaj.

Kortuŝa estas la biografio de Zamenhof. Eĉ kordisŝira por tiuj, kiuj scias ĝin legi kun plena kompreno de la personeco de la protagonisto kaj de la cirkonstancoj. Kiom da bono por la estonteco de la tuta afero de la Inter-

nacia Lingvo, se tiu biografio povus esti por kelkaj ankaŭ iom instrua!

☆

Oni facile povus menciigi pliajn negativajn aspektojn, ekzemple plurajn negativajn trajtojn en parto de nia gazetaro, pri kio eble alian fojon, sed la supre tuŝitaj certe sufiĉas por montri kial la progresado — ĉar sendube ni progresas — ne estas kontentiga. Ne temas pri manko de pozitivaj fortoj. Ili estas multnombraj, ĉiufankaj, troveblaj ĉiuloke, nemalofte vere admirindaj. Temas pri la troa pezo de la negativaj elementoj. Maksimuma progresado estos ebla en la hodiaŭaj cirkonstancoj eĉ per la nun disponeblaj, relative modestaj, materiaj rimedoj nur tiam, kiam la Movado sukcesos definitive forigi la ĉefajn negativajn fortojn kaj tiamaniere liberigi ĉiujn pozitivajn fortojn el la ĉenoj, kiuj katenas ilin. Tio estas kaj necesa kaj ebla. Tio samtempe malfermos la pordon por alfluo de novaj pozitivaj elementoj. Kaj tio donos al la tuto novan svingon.

Ivo Lapenna

**kelkaj
kaŭzoj de
nekontentiga
progresado**

KOMUNIKO DE LA ESTRARO

Per skriba voĉdonado la Estraro de UEA faris jenajn decidojn:

1. Altigi la subvencion al la Akademio ekde la jaro 1964 al la sumo de 1.000 gld. jare;
2. doni aŭspicion de UEA al la filmo "Angoroj";
3. okazigi dum la Universala Kongreso en Hago 2 ĝeneralajn kunvenojn kaj 2 sekciojn, el kiuj unu ĝenerala kunveno pri traktos la temon "La Rezultoj de la Junulara Jaro", la alia ĝenerala kunveno diskutos, kiel kutime, la Estraran Raporton, dum unu sekcio havos kiel ĉeftemon "La Eduka Valoro de la Instruado de la Internacia Lingvo en la Lernejoj", kaj la dua sekcio rilatos al "Aplikado de Modernaj Metodoj en la Informado pri Esperanto";
4. elekti jenajn temojn por la Oratora Konkurso: (a) Juna Sciencisto antaŭ Lingvaj Baroj, (b) La Rolo de Esperanto en la Lerneja Programo, (c) La Senco de Lingvo-

Instruado en la Lernejoj, (ĉ) Ĉu la Latina kaj Greka Lingvoj Necesas en Lernejo kaj Universitato, (d) Metodoj de Informado en Junularaj Medioj;

5. Laŭ la decido de la Komitato formi apartan Konsultan Komisionon pri Lernejoj, kiu konsistas el Prof. D-ro Ivo Lapenna, S-ro E. Malmgren, S-ro R. Markarian kaj S-ro P. Zlatnar;
6. nomi D-ran A. Albault redaktoro de "Monda Kulturo" kaj esprimi dankon al la ĝisnuna redaktoro S-ro Mag. W. Auld;
7. nomi S-ran E. P. Ockey sekretario de la Belartaj Konkursoj kaj esprimi dankon al S-ro Mag. W. Auld pro la ĝisnuna funkciado kiel sekretario de la B.K.;
8. komisi la Ĝeneralan Sekretarion kiel estraron pri la fako kongresoj;
9. aprobi la buĝetproponon por la 49-a U.K. en Hago;
10. aŭspicii la "Eŭropan Esperanto-Konferencon" en Vieno, 1965, du semajnojn antaŭ la U.K. en Tokio.

NOVA GRAVA AKIRO POR LA BIBLIOTEKO DE UEA

La nederlandano H. J. Bulthuis (1865-1945) estas ĉefe konata al la nuna generacio de Esperantistoj kiel aŭtoro de pluraj originalaj romanoj, sed ankoraŭ pli aktiva li estis kiel tradukisto el pluraj naciaj lingvoj. Liaj plej ampleksaj tradukoj jam eldonitaj estas la romano "Jane Eyre" de Charlotte Brontë, kaj la dramo "Imperiestro kaj Galileano" de

Ibsen. Inter la lastaj laboroj de Bulthuis estis du tre gravaj: kompleta traduko de ĉiuj 74 ĉapitroj de la majstroverko de Cervantes, "Don Kiĥoto", kaj esperantigo de la ĉefverko de Erasmo, "La laŭdo de la malsaĝeco". Pri la kvalito de tiuj tradukoj povas fidigi la reputacio de Bulthuis kiel verkisto kaj la fakto, ke li estis membro de la Lingva Komitato. Ni dankas al ges-roj Isbrucker en Hago, ke ili decidis konfidi al UEA la konservadon kaj laŭeble eldonon de la menciitaj kaj aliaj manuskriptoj, ricevita de S-ro Rico Bulthuis.

**esperanto
januaro
1964**

Pri ĉi tio, multe oni parolis, sed preskaŭ nenion oni faris.

Estas tiuj, kiuj kredas, ke oni povas antaŭenigi la aferon per aperigo de fakvortaroj, sed por kio ili taŭgos, se ne ekzistas la koncerna literaturo?

Sciencistoj kaj teknikistoj ekvalorigos E-n, nur kiam ili vidos konkretajn faktojn. Ili ankaŭ estas okupitaj personoj, kaj certe ili ne proponos al si novan taskon, se ili ne trovos ĝin celtrafa. Ekzemple: ĉu iu aĉetus televidaparaton, se en lia urbo aŭ lando ne estas televidstacio? Ni estas idealistoj, kaj ni lernis la lingvon, ne pro ĝiaj nunaj avantaĝoj (kiuj tamen ja estas multaj), sed antaŭvidante, aŭ dezirante pli bonan estontecon.

Se ni deziros pli kaj pli universaligi ĝian uzadon (kaj tio devas esti nia plej grava tasko) ni devos memori, ke ne ĉiuj homoj estas idealistoj. Sciencistoj kaj teknikistoj ne estas escepto al ĉi tiu regulo. Revenante al la antaŭa ekzemplo: por vendi televidaparatojn, unue oni devos starigi televidstacion; se ni deziros interesi tiajn fakulojn, ni devos montri al ili librojn, revuojn, resumojn de verkaĵoj, ktp., pri iliaj fakoj, kaj NE fakvortarojn.

Nia tasko devas esti kiel eble plej multe krei sciencan kaj teknikan literaturojn. NE artikolojn pri la utileco de E. en sciencoj kaj tekniko, SED rekte fakajn, seriozajn verkaĵojn. Ni devas preni la ekzemplon de la japanaj kuracistoj: ili aperigis la librojn: "Nia korpo" (simplan, por nefakuloj), kaj "Lernolibro pri Oftalmologio" (fakan, por specialistoj). La lokaj kaj naciaj E-Societoj devus prizorgi kiel eble la havigon de tiaj libroj kaj similaj publikaĵoj al bibliotekoj de koncernaj Fakultatoj, Altlernejoj, esplorcentroj. Eble, en la unuaj momentoj, neniuj legos ilin, sed almenaŭ oni ekkutimigos la fakulojn; ili ekkonscios ke E. ne estas nur projekto, revo, flanka afero, sed vivanta fakto ĉar ĝin uzas samfakuloj: ni memoru, ke ĝenerale oni prijuĝas la faktojn, kiel funkcion de propraj interesoj aŭ fako.

Iom pli pri fakvortaro: ĝia utilo estas relativa, por tiuj kiuj deziras traduki verkaĵojn Esperanten. Se temas pri "Terminaro", ĝi ne povos helpi por trovi vorttradukon, ĉar en ĝi, oni trovas la signifon nur de vorto antaŭe konita. Se temas pri "Vortaro", la terminoj estas ordigitaj nacilingve, laŭ alfabeto ordo. Sed... estas multaj naciaj lingvoj, kaj la fakoj estas multaj. Ĉu la solvo? Laŭ mia ankoraŭ mallonga sperto, pri tradukado de sciencaj verkaĵoj, mi trovis bonan helpon per antaŭa lego de samfakaj artikoloj. Por traduki artikolon pri kristalografio, mia sola helpo estis la artikolo de P. Hartmann "Pri limigantaj facoj de kristaloj" aperinta en "Sciencaj Studoj". Por traduki la verkaĵon "Limfografio de la testika limfunuo", mi ankaŭ trovis bonan helpon en la antaŭmenciita libro "Nia Korpo". El tio, mi ekpensis, ke anstataŭ eldoni fakvortarojn, oni povus profiti pli la necesajn klopodojn (almenaŭ en la unuaj etapoj de ĉi tiu neprokrastebla tasko) per eldonigo de

simplaj faklibroj laŭ la modelo de la laste nomita, ekzemple: traktatoj pri kemio, biologio, elektro, ktp.

A. Barrocas (Montevideo)

DU PROPONOJ AL I.A.T.

Laŭ la recenzoj aperintaj en la Esperanto-gazetaro montriĝas, ke la *Internacia Arta Teatro* sin daŭre plibonigas de jaro al jaro, kaj ke temas pri vere profesia teatro batalanta por kaj per ideoj kaj pensoj; ne temas pri fervora grupo de talentaj amatoroj. Tiu atingo, laŭdinda kaj gratulinda, proponigas ke I.A.T. estontece al ĉiu kongresa teatra prezentado invitu la profesiajn kritikistojn de la grandaj tagjurnaloj en la kongresurbo. La internacia lingvo ja jam sukcese konkuras kun la naciaj lingvoj de la mondo, kaj tion pruvi povos I.A.T. kiel plenvalora profesia teatro sukcese konkuranta kun naciaj teatraj trupoj. Tamen ni bezonas la kritikistojn de la grandaj ĵurnaloj por informi la publikon pri la pozicio de Esperanto en la arta mondo. Eble kelkaj el la kritikistoj trovos en la komenco pli multajn mankojn ol kvalitojn, sed tian kritikon oni devas ne nur riski, sed preskaŭ inviti, ĉar sendube tia kritiko efektive kontribuos al la plej rapida plibonigo de la teatro kaj plej profunda plipurigo de ĝia aktorado.

Cetere mi memorigas pri la fakto, ke 1964 estas la 400-jara jubileo de la naskiĝo de *William Shakespeare*, kaj tiu jubileo estos celebrata en ĉiuj mondpartoj. Ĉu I.A.T. ne devus kontribui al la celebrado per prezento de dramo de Shakespeare ĉi-jare?

Fine, por apogi la agadon de nia teatro mi sendas al ĝi ĉi-kune donaceton de \$ 10, esperante ke aliaj legantoj sekvu mian ekzemplon tro modestan.

Teatroamanto.

PRI JAPANAĴ ANARKIISTOJ

Aperis eraro ĉe la nova verko de nia verkistino Marjorie Boulton 'Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto'. Temas pri: 'En Japanujo estis nigra epoko por Esperanto, kaj oni ĵus pendigis dek sep japanajn esperantistojn kiel "anarkiistojn".' (p. 220).

Kompreneble ŝi heredis de alia verko 'Leteroj de L. L. Zamenhof' kompilita de Gaston Waringhien. En ĝi la kompilinto komentas interalie: 'Okaze de la nova jaro Sebert sendis al Zamenhof siajn bondezirojn... En Japanio, 17 el la 24 tieaj esperantistoj, estis pendumitaj, pro ribelo...' (Vol. 2, p. 349).

La fakto menciita neniam ekzistis en nia lando. Pri la miskompreno ni havas divenon: iu esperantisto-anarkiisto kredeble skribis leteron aŭ similan al sia eksterlanda amiko, ekzemple jene: niaj kamaradoj estis pendigitaj. Kaj la vorto 'kamarado' elvokis miskomprenon ke tiuj devas esti esperantistoj, dum la skribinto parolis pri siaj kamaradoj politikaj.

Miyamoto Masao (Osaka)



Moderna nederlanda arkitekturo

R. C. Hekker

Reformpreĝejo en Utrecht (F. Dingemans)

Preskaŭ ĉiam, kiam nederlandano rigardas alilandan verkon pri arkitekturo, por ekscii, kion oni skribis pri lia lando, li devas iom ĉagreniĝi. Krom pri la romanikaj preĝejoj en Maastricht, la gotika urbodomo de Middelburg kaj la klasika palaco en Amsterdam li apenaŭ povas trovi mencion pri la pasinteco.

Tiel eksterlandanoj ofte ricevas la impreson, ke en Nederlando troviĝas malmulto interesa en la kategorio-de mezepoka arkitekturo kaj ke tiujn malmultajn konstruaĵojn, kiuj entute meritas atenton, oni verkis laŭ importitaj stiloj. Sed se la alilandaj aŭtoroj bonvolus persone esplori la aferon, do certe ŝanĝiĝus iliaj opinioj pri la atingoj de nederlandaj arkitektoj. Necesas konsenti, ke "elstaraj" arkitekturaĵoj ne estas abundaj, sed la "ordinara" arkitekturo havas tiel klare difinitan propran karakteron, ke ĝi meritas pli vastan konatecon en eksterlando. Ke en Nederlando troviĝas malmultaj katedraloj riĉe ornamitaj kaj palacoj lukse grandiozaj, tio devenas el la burĝa tradicio. Jam en la mezepoko la modon difinis la gustoj de majstraj metiistoj kaj komercistoj, kaj la karakteron de nia arkitekturo fiksas ĝuste la konstruaĵoj menditaj de tiuj burĝaj klasoj. Ni pro tio devas direkti nian atenton al la domoj, urbodomoj, urbopordoj kaj gildodomoj; t.e., tute alie, ol en la

pli feŭdaj landoj, kie la burĝa arkitekturo fariĝis tute sensignifa apud tiu de nobeluloj kaj superaj ekleziuloj.

Kiam oni konsideras pli detale la tiutempan nederlandan arkitekturon, tiam oni konstatas, ke krom ĝia propra burĝa karaktero distingiĝas ankaŭ alia aspekto: nome, ia du-dimensia kaj bildeca stilo. Ankaŭ de tio la kaŭzo estas evidenta, ĉar oni facile komprenas, ke en lando ebena sen montoj aŭ krutaĵoj la indiĝenoj ne posedas denaskan senton pri la beleco de grandaj plastikaj kaj klaraj kontrastoj. Ili do emfazas prefere la aranĝon, ĉarmon kaj detalaĵojn de la fasadoj.

Tiutempaj arkitektoj traktis la fasadojn kiel pentraĵojn: la murojn ili konstruigis el flavaj, brunaj aŭ ruĝaj brikoj kaj ornamis per blokoj, strioj aŭ ornamaj skulptaĵoj, kaj la lignaĵojn de la fenestroj, pordoj, ŝutroj, defluiloj kaj ŝirmiloj ili hele farbigis. Ĉar la nederlanda suno malofte donas klarajn ombrojn, masivaj siluetoj ne havas grandan sencon, sed necesas zorge elpensitaj kadroj kaj reliefaĵoj, por ke tiel la arkitekturaĵoj restu plaĉaj ankaŭ dum malhela vetero.

Nur en la fino de la 19-a jarcento finiĝis la "bildeca" arkitektura stilo. Influite de la eksterlanda nov-klasikismo, oni komencis formaligi la fasadojn kaj kovri ilin per kalko.

Tuj malaperis ilia propra karaktero kaj sekve fariĝis malpli interesaj kaj pli unuformaj la stratoj. Kiam oni en 1875 revenis al la malnova stilo, ne okazis tamen pliboniĝo, ĉar al la klopodoj imiti la antaŭajn formojn kaj aranĝojn mankis la interna ideo de tiu stilo.

Necesis originala arkitektura filozofio; en Chicago tion ellaboris Sullivan, aplikante ĝin al siaj oficejaj konstruaĵoj, kaj en Amsterdam tion faris Berlage. Liaj verkoj kreis tiom da interesiĝo kaj en- kaj ekster-lande, ke eĉ la alilandaj lernolibroj menciis lian nomon. Jam en 1893 kaj 1895 li konstruigis grandajn oficejojn, sed lian reputacion kiel la granda renoviganto definitive establis lia Amsterdama Borso en 1898. La Borso estas brika konstruaĵo, kies interna strukturo montriĝas senkaŝe ankaŭ en la fasadoj. Tio validas ankaŭ pri la feraj traboj de la halo. Kamuflaĵojn, falsajn fasadojn, nenecesajn ornamaĵojn li forbalais. Berlage komencis la konstruadon el la interna strukturo.

Kvankam Berlage multe influis siajn kolegojn, kiuj siavice konvinkiĝis, ke ĉesu la imitado de aliaj stiloj, ili tamen komencis protesti kontraŭ lia t.n. raciismo, tiu preskaŭa severeco, kiu neniam povis akcepti kompromison. Oni sentis, ke lia sentrompa pritrakto de la materialoj estis tro ordinara, kaj liaj projektoj seninteresaj.

Reago estis neevitebla, kaj post la apero de kelkaj pli romantikaj konceptoj Van der Mey projektis sian "Scheepvaarhuis" en Amsterdam en 1911. Ĝi estis la unua konstruaĵo en Nederlando verkita laŭ la principoj de la esprimisma skolo. Severecon anstataŭis fleksebleco, rigidaj linioj fariĝis pli fluaj kaj permesis iom kapricajn konturojn, kaj diversaj ornamaĵoj fakte elpensitaj de la arkitektoj mem ekregis sur la fasadoj.

El la pentristoj Mondriaan kaj Van Doesburg kaj la arkitektoj Oud, Wils, Van Eesteren kaj Rietveld formiĝis ĉirkaŭ la fino de la unua mondmilito nova grupo, kiu prezentis siajn ideojn en revuo nomita "de Stijl". Ili malakceptis la antaŭan pezan stilon kun ĝiaj ornamaĵoj kaj akceptis kiel ĉefprincipon tiun de Berlage: puran funkciismon de la interna konstruo. Aliflanke, ili favoris novan eksteran stilon bazitan sur heleco, libereco kaj spaco, kaj ili utiligis tiucele la plej modernajn materialojn. Anstataŭ altaj mallarĝaj fenestroj, grandaj vitroj en ŝtalaj kadroj rompis la fasadojn ĉie, kie tio ŝajnis dezirinda. Kaj internaj kaj eksteraj muroj restis sen ornamaĵoj. La tuta strukturo restis kuba, do kun plata tegmento. Kvankam tiaj projektoj povis ŝajni utilismaj, tamen ankaŭ estetiko havis sian rolon. Ne temis pri la estetiko de ornamado sur tiaj unuarangaj materialoj, sed pri kubisma interrilato de horizontalaj kaj vertikalaj linioj kun kelkaj eroj da brila koloro sur tiu hela fono.

Oni bone povus diri, ke la plastikismon de la "Amsterdama skolo" anstataŭis abstrakta pentrado.

Ĝis la fino de la 20-aj jaroj ambaŭ skoloj laboris paralele, sed necesas memorigi, ke ili estis du ekstremoj. La pli multaj arkitektoj

aliĝis nek al unu nek al la alia, sed restis inter la du, samtempe memorante dum sia laboro la verkojn de Berlage kaj aliaj antaŭuloj. Malgraŭ ĉio, kelkaj formis al si vere propran stilon, kaj en tiu ĉi kunteksto oni devas menciigi Dudok. Lia ĉefverko de tiu periodo troviĝas en Hilversum, la vilaĝo, el kiu li kiel urba arkitekto kreis ĝardenurbon. La urbodomo, kiun li konstruis tie en 1927, estas unu el la kreaĵoj plej alte ŝatitaj en la internacia arkitekta sfero antaŭ la dua mondmilito.


Intertempe la Amsterdama skolo formortis nature kaj la Stila Grupo iom post iom diseriĝis. Estas vero, ke la ideoj de tiu movado ne tute malaperis, sed antaŭ proksimume 1930 la internacia kontakto inter funkciistoj, ekzemple Gropius kaj Le Corbusier, jam multe kontribuis al rilatigo de arkitekturo al urĝaj sociaj bezonoj. Unuavicaj konsideroj fariĝis tiuj pri komforto en hejmoj kaj oficejoj, kaj oni komencis konsekvence pli atenti al la formo de la spaco, en kiu la homoj devas vivi, ol al la ekstera aspekto. Kompreneble tiu skolo atingis siajn plej kontentigajn rezultojn sur la kampo de utilisma konstruado, kiu postulas unuavice celtaŭgecon. La fabrikon de Van Nelle, projektitan de Brinkman kaj Van der Vlugt, oni rajtas rigardi kiel plej elstaran verkon de la antaŭmilitaj funkciistoj.

Priskribo de la ĉefaj trajtoj de la nuntempa funkciismo estas nefacila: ĝi havas multajn aspektojn, kvankam ekzistas komuneco en la aplikado de novaj tri-dimensiaj planoj, novaj konstru-teknikoj kaj -materialoj. Kelkaj ekzemploj de la verkoj de bone konataj arkitektoj devas sufiĉi por iom komprenigi la plej lastan evoluon.

La plej notinda personeco estas tiu de Rietveld, kiu aniĝis al la Stila Grupo en 1918 sed post ĝia disiĝo restis en mallumo. Diference disde la aliaj grupanoj li restis ĉiam fidela al la tiamaj principoj, eĉ kiam poste la celoj de la Stila Grupo ne plu estis laŭmodaj. Sed kiam post la milito oni povis rekapti la fadenon de la "Nieuwe Bouwen" (nova konstruo) kaj rekonsideris la verkojn de la Stila Grupo, tiam Rietveld refamiĝis. Intertempe lia stilo plielegantigis, kiel evidentiĝis tuj kiam li ricevis pli da mendoj. La meritoj de lia laboro estas plej videblaj en kelkaj bangaloj kaj ekspoziciaj pavilonoj.

La plej bona rimedo por ekkompreno de hodiaŭaj direktoj en la nederlanda arkitekturo estas vizito al Rotterdam. Post la detruo dummilita de la urba koro, oni projektis tute novan urbo-centron, kiu nun jam estas preskaŭ finita. Ankaŭ ĝiaj modernaj loĝkvartaloj estas elstaraj, kaj tiel fariĝis tiu dua plej granda haveno de la mondo ankaŭ centro de intereso al tiuj, kiuj okupiĝas pri arkitekturo kaj urba planado.

Tie estas multaj novaj eltrovoj aplikitaj. La arkitektoj Van der Broek kaj Bakema konstruigis vendejojn kaj domojn, kiuj per siaj seninterrompaj surfacoj kaj horizontalaj fenestroj impresas iom usone. Aliflanke, tiuj samaj arkitektoj montris sian plenan originalecon en la projekto de la Lijnbaan, butikita komplekso




**moderna
nederlanda
arkitekturo**

Maldekstre: du projektoj por la nova ĉef-oficejo de la kompanio "De Nederlanden van 1845".


el kiu estas tute elbarita la trafiko, tiel ke piedirantoj neniom timu pro aŭtomobiloj k.s.

Resumante la arkitekturan evoluon de la pasintaj ses jardekoj, kaj klopodante por iom simplige sistemigi ĝin, ni povas indiki diversajn konstruaĵojn, kiuj signis sian tempe ian renovigon, kaj kiuj staras kiel mejloŝtonoj sur la vojo de la nederlanda konstruado: la Borso de Berlage, la "Scheepvaarthuis" de Van der Mey, unu domo en Utrecht de Van Rietveld, kaj la fabriko Van Nelle, de Brinkman kaj Van der Vlugt — se ni menciigu nur la antaŭmilitajn.

Facile povus esti, ke kiel mejloŝtonon de la nuna periodo la venontaj generacioj elektos la estontan ĉefoficejon de la kompanio "De Nederlanden van 1845".



Dekstre: bangalo, de la arkitekto Rietveld.



**esperanto
januaro
1964**

9



LA TRANSMONDA MIGRANTO

EN ESPERANTO

La Dia Komedio, de DANTE ALIGHIERI. Traduko de Giovanni PETERLONGO paralele kun la itala teksto. Eld. Edizione SIEI. Milano, 1963. 709 p. 28 × 21 cm., kun antaŭparoloj de Bruno MIGLIORINI, Paolo PETERLONGO, Piero BARGELLINI kaj Gaston WARINGHIEN, kun komentariaj notoj, listo de variantoj, indekso de propraj nomoj kaj 89 tutaĝaj reproduktaĵoj de la originalaj ilustraĵoj de Sandro BOTTICELLI. Prezo tole bindita kun plasta ŝirmilo kaj kartona skatolo: 36,— gld. (144 st).*

Kiel belega libro, kiel impona, kiel amefarita, vere la tipo de tio, kion oni povas diri reprezenta! La plena Komedio, kiun la postepoko rajte nomis Dia, en eldono ne malinda al la grandioza Verko!

"Ultima regna canam" — tiel, do latine, komencis Dante origine sian ĉefverkon, laŭ Boccaccio. Sed poste li tamen konfidis ĝin al la "vulgara elokvento", al la si-lingvo, kiu nur tiutempe komencis vivi per la "dolĉa stilo nova". Kaj Johannes de Vergilio, humanista profesoro el Bologna, kiam li laŭdis la Komedion en latina versletero al Dante (en 1309), samtempe riproĉis ties nelatinan lingvon; la vulgara si-lingvo tiam ankoraŭ ne estis honorata de altbrovuloj. Hodiaŭ, evidente, tia sama riproĉo povas trafi Esperante verkantan aŭtoron: kial ne nacilingve, kial en la "artefarita elokvento"?

La hodiaŭa legonto de la Komedio povas al si meti la demandon: kion povas al mi signifi ĉi tiu poeto, se mi ne havas fakan interesiĝon pri la mezepoka historio, pri la tiutempa historio de la italaj urboj, nek pri la katolika teologio.

Certe, la Komedio enhavas kelke da morta materialo. Malpleje en la Infero, iom pli en la Purgatorio, pleje en la Paradizo. Tial oni kutimas diri, ke Dante ne estas facila legaĵo, kaj eĉ li mem skribis, ke volante lin kompreni, oni devas sidadi sur la benko kaj bone akrigi sian menson. Sed estus troigo emfazi tiun malfacilecon.

La epoko, pri kiu Dante parolas, estas unu el la plej interesaj de la historio: la antaŭrenesanco, la interlukto inter la feŭda — religia ligiteco kaj la liberiganta individueco. La Komedio estas plena de perfidoj, perfortoj, kruelaĵoj, grandaj krimoj kaj grandaj virtoj, de interesaj historioj kaj anekdotoj, kiujn Dante ofte nur aludas per kelkaj skizaj vortoj akompanataj de persona emocio amika aŭ malamika. Ofte ni devas tiujn historiojn elspuri el la komentoj, sed tiu esplorado mem estas interesa, ĉar oni pli kaj pli penetras en la vivon kaj etoson de la epoko. Kaj se oni poste, konante jam la materialon, relegas la verkon, oni estas kuntrenata de tiu svarmo de homaj sortoj, kaj eĉ pli kuntrenata de tiu potenca, pasia, partia, siamaniere-justa, puna-

rekompensa poeto-individuo, kiu tie juĝas super vivantoj kaj mortintoj. Tiam ĉio en tiu individuo fariĝas interesega, liaj eraroj nin ekscitas, ni diskutas kun li pasie, kaj malgraŭ tio amas lin.

Tiu potenca individueco, interna lirikismo inundanta ĉiujn versojn, impregnanta la tuton per muziko, savas la verkon de tio, ke ĝi estu mozaiko de epizodoj. Tiu interna lirikismo apartigas la verkon de Dante disde la ceteraj "grandaj epopeoj" de la mondliteraturo. Tiuj esprimas la animajn aŭ historiajn krizojn de iu genta aŭ religia kuno en objektiva kaj kolektiva maniero, Dante rakontas la internan historion de sia propra animo tra la larmaj kaj sangaj okazaĵoj de la epoko.

"Shakespeare — diras tre bele T. S. Eliot — scias pli grandan disvaston kaj variecon de la homa animo ol Dante, sed Dante venis al pli profunda grado de falinteco kaj al pli alta grado de sublimiĝo."

Inter liaj artaj kapabloj la plej elstara estas lia povo de figurado. Ĉion li vidas draste kaj ĉion li vidigas draste al sia leganto. La Infero ne restas ia neimagebla fantasmagorio: la leganto povas esti certa, ke li ne voĵeraros inter la rondoj kaj pontoj de la terura funelo (pri kiu, cetere, multon legindan oni trovas en la "Lingvo kaj Vivo" de Waringhien). Dante, ĉi tiu spiritala poeto estas samtempe unu el la plej grandaj realistoj de la mondliteraturo. La scenoj, kiujn li pentras, estas tiom realgustaj, ke la leganto kvazaŭ forgesas, ke li iradas la inferon kaj ne iun malnovan urbon italian. Kaj eĉ en la Paradizo, kie li teksas siajn strofojn el lumo kaj etero, kiel draste ni revenadas subite en la amatan-malamatan Firenzen!

Tra la sufoka peza atmosfero de la divdiga Italia, tra la konstantaj sangaj partiluktoj, konfiskoj, mortkondamnoj, ekziloj kaj ekzekutoj de la naskurbo, tra la malice ĵaluza rivalado de papoj, imperiestroj, reĝoj, princoj vadas nia poeto, kaj ne multe eraris la naivaj virinoj de Verona, kiuj interflustris post la preteririnta poeto: "Jen tiu, kiu trairis la inferon." Kaj tiu tuta infero enestas en la Verko, sed enestas ankaŭ la blankaj radioj de la amo al Beatrice, kiu estas — kiu do scias? — eble la perdita dolĉe reva knabaĝo, eble la teologio, eble la miraĝo, kiu radiante brilas super la sanga kaj putra dezerto.

La traduko de Giovanni Peterlongo estas pia, sindona, eĉ sinofera laboraĵo de iu, kiu adoras sian majstron kaj preskaŭ fandiĝas en li oferante sian propran personecon. Certe tiu ĉi traduko ne povas rivali, nek daŭrigi la poezian forton, geniajn solvojn kaj vortmuzikon de la Infero-traduko de Kalocsay, ĝi fleksiĝas al la originala teksto humile kaj fidele kaj bonege helpas la komprenon de la kontraŭflanka itala teksto al tiuj, kiuj sen ĝi ne povus rompi al si vojon tra la densaĵo de la Dantea lingvo. Tio estas nemalgranda merito, precipe se ni konsideras, ke en la tempo, kiam la tradukinto laboris, nia poezia lingvo ankoraŭ ne atingis sian nunan nivelon de evoluo. Kvankam li rezignis la rimojn, li konservis la ritmon de la originalo, kaj ĉi

tiu ligiteco lin devigis plurfoje al solvoj fra-paj, plaĉaj kaj surprizaj. Granda laboro: omaĝon al la laborinto!

La pli ol sepcentpaĝa entuziasmige bela volumo enhavas krom la dulingva Dante ankaŭ la unuan plenan kolekton de la Dante-ilustraĵoj de Sandro Botticelli. La historio de tiuj ilustraĵoj, ilia perdiĝo kaj retrovo mem estas interesega, sed tion jam rakontis D-ro Ivo Lapenna en la Marta numero. La elekto inter la realistaj kaj stilizitaj ilustraĵoj de Dante certe estis feliĉa ĉi-okaze: Botticelli, kiun ne disigis granda tempospaco disde Dante, eble plej danteske povis transmeti lian mondon en siajn liniojn.

La verkon eldonis la eldonejo SIEI en Milano, en la serio Oriento-Okcidento. Kaj monumento estas tiu ĉi libro: monumento de Dante kaj de Esperanto.

Lajos Tárkony (Budapest)

Noveloj de Lusin. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 464 p. 21 × 13 cm., bindita. Kun portreto de la aŭtoro kaj kun multaj ilustraĵoj. Prezo: 6,75 gld. (27 st.).*

Per tiu ĉi zorge pretigita volumo Ĉina Esperanto-Ligo prezentas al ni en proksimume sama amplekso kiel la "Ĉina Antologio" preskaŭ kompletan kolekton de la noveloj de Lusin. Unue necesas klare diri, ke Lusin (1881-1936) estis verkisto de monda formato. Ke necesas tion diri — nome, ke tio ne estas jam bone konata ekster Ĉinujo — estas honto al la cetera mondo kaj pruvo pri la nejusteco de la nuntempa lingva situacio. Neniu verkisto, kiu scias per tiaj koncizo kaj trafeco konsciigi nin pri la krueleco, nobleco, kaj kompatindeco de la homa karaktero, devus resti inter la limoj de unu sola nacia lingvo.

Tiuj ĉi 30 noveloj, kvankam ĉiuj en la kadro de la ĉina vivo, kaj preskaŭ ĉiuj en tiu de la moderna antaŭrevolucia ĉina vivo, tamen ampleksas tiel vastan temaron, ke por karakterizi la tutan kolekton oni devas kontentigi per tiaj kliŝigintaj esprimoj, kiaj ekzemple "profunda homeco", "penetra vivobservo" aŭ similaj. Sed se ni difinu iun karakterizon pli propre Lusin'an, eble do ni menciunuavice la delikatan ekvilibron, kiun li sciis establi inter tragedio kaj komedio. Legante liajn novelojn, oni ofte sin sentas duone inter rido kaj ploro, kaj ĝuste tiam plej forte impresas la efekto de realeco. La okazaĵoj, kiujn li rakontas, estas ofte groteskaj, sed ĉiam tiu groteskeco ŝajnas tiu sama, kiun ni mem rimarkas en la propraj vivoj, kaj neniam tiu arte troigita, kiun ekspluatis ekzemple Flaubert.

Ne temas nur pri ekvilibro en la aŭtora sinteno al la okazaĵoj rakontitaj, sed ankaŭ pri ambaŭflanka pentrado de la personoj: neniun "heroo" prezentiĝas sen siaj mankoj, siaj malfortaĵoj, sia ridindeco. Kaj, kvankam la simpatio de Lusin restas ĉefe ĉe la malriĉaj kaj senavantaĝaj homoj, tamen la leganto sentas, ke iliaj esencaj karakteroj povus sub aliaj cirkonstancoj fariĝi nedistingeblaj disde tiuj de la regantaj klasoj, kaj ke la socia

strukturo estas nur ia supra aldono al la komuna homeco de la personoj. Tion substrekas, ekzemple, la sugestoj pri samfamilianeco de A-Q, la vilaĝa sentaŭgulo, kun la sinjora moŝto Ĝaŭ, en la plej longa kaj plej eksterordinara novelo de la kolekto: "La ĉefa historio de A-Q".

Kiel instruita homo en tiame plejparte analfabeta popolo, Lusin memkompreneble dediĉis multan atenton al la malakordoj sociaj kaj psikologiaj, kiujn kaŭzas la enpenetro de raciaj konceptoj en superstiĉan vilaĝan vivon: vidu ekzemple en "La ĉiam brilanta lampo", "La soleca homo", k.a. Sed same multe okupis lian penson psikologio de la familia vivo, precipe kiam ĝin subfosas malriĉeco kaj senlaboreco. Per lia genia prozo oni ekkomprenas la veran signifon de "malriĉeco" kaj "malsato": ne nur la fizikan suferon, sed precipe la spiritan humiligon, kiun kunportas la lukto por manĝaĵo. Laŭ la vortoj de Gjuanseng en "Funebro pri l' forpasintino": "Homo unue devas vivi, kaj poste la amo havas ion, al kio ĝi povas alkroĉiĝi".

V. Sadler

Pri la ĝusta traktado de kontraŭdiroj interne de la popolo, de MAŬ Zedong. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 61 p. 18 × 13 cm. Prezo bind. 1,00 gld.; broŝ. 0,50 gld.*

En tiu represo de prelego el 1957 Maŭ Zedong konstatas, ke komunisma lando havas krom la neakordigeblaj diferencoj kontraŭ la malamikoj en- kaj eksterlandaj ankaŭ kelkajn kontraŭdirojn inter siaj anoj en la socialisma socio. Ĉe tiuj kontraŭdiroj la pravo sukcesos.

Decidaj argumentoj, de L. MIMÓ, postparolo kaj studo pri la participoj, komplementaj al la verko "Perfektecio de la Esperantaj Verboj". Eld. la aŭtoro, Barcelona, 1963. 18 p. 24 × 17 cm. Prezo: 0,75 gld. (3 st.).*

Surbaze de la reeĥoj al lia antaŭa verko (vd. ekz. "Esperanto", majo 1962), la aŭtoro en tiu ĉi nova broŝuro precizigas kaj parte korektas siajn asertojn pri la participa problemo. La ĉefan parton konsistigas studo pri la aspektoj de preteritaj tempoj en latinidaj lingvoj (fr., hisp.), rezultanta en la konstato (p. 10), ke tie "oni esprimas... la aspekton de finiĝo sendepende de tio, ĉu la ago estas longdaŭra aŭ momenta".

E. Vilborg (Göteborg)

Skolta kaj tenduma terminaro, de J. K. HAMMER. Eld. Skolta Esperantista Ligo, 1963. 26 p., 18 × 11 cm., ilustr. Prezo: 0,75 gld (3 st.).*

La terminaro estas la unua esperanta terminaro por skoltoj, kiu tiel larĝe traktas pri la ĉefaj problemoj de la skoltmovado. Skoltajn terminojn oni klarigas priskribe en kadroj de apartaj problemoj. Do ĝi ne estas laŭalfabeta kaj kreas malfacilaĵojn por laikoj, kie trovi serĉitajn terminojn. Estus bonege eldoni duan parton kun terminoj laŭalfabete kaj ankaŭ ampleksi skoltajn komandojn, kiuj nune havas diversajn nomojn en Esperanto. La terminaro tamen solvas multajn problemojn, kiuj ekzistis inter skoltoj-esperantistoj de diversaj nacioj.

A. Grzębowski (Pollando)

Provoj por akiro de l-tioksino markita per I-131, de J. L. SERVIAN. Eld. Fakultato de Kemio, Montevideo, 1963. 4 p. 30 × 21 cm., multobligita, ilustrita.

La internacia lingvo Esperanto, komuna lingvo por Afriko, de Tibor SEKELJ. Eld. Charles Thollet, 64 rue Mohammed el Amraoui, Kenitra, Maroko, 1962. 16 p. 21 × 14 cm. Arablingva eldono de la konata broŝuro jam aperinta en angla kaj franca lingvoj.

Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud, de Jean RIBILLARD. Eld. Stafeto, La Laguna, 1963. 128 p. 19 × 12 cm, plus 6 bildopaĝoj. Serio Beletraj Kajeroj n-ro 18. Prezo: 5,70 gld. (22,8 st.) Aŭtobiografio de azeno.

Aventuroj de pioniro, de Edmond PRIVAT. Eld. Stafeto, La Laguna, 1963. 144 p. 19 × 12 cm, kun 18 bildopaĝoj. Serio Beletraj Kajeroj n-ro 17. Prezo: 6,85 gld (27,4 st). Personaj rememoroj.

Anne Frank Huis (Domo Anne Frank), eld. Prinsengracht 263, Amsterdam-C, Nederlando. Faldfolio seplingva ink. Esp.

La origino kaj disvolviĝo de la malakordoj inter la gvidantoj de KPSU kaj ni, de la redakcioj de "Renmin Ribao" kaj "Ruĝa Flago". Eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 64 p. 18 × 13 cm. Prezo: 0,55 (2,2 st).

Limfografio de la testika limfunuo: klinikaj aplikoj, de M. ANGEL SICA kaj R. RODRÍGUEZ SICA. Eld. Fakultato de medicino, Universitato de la Respubliko, Montevideo, 1963. 8 p. 30 × 21 cm., multobligita, ilustrita.

Taboj por mezuri premojn de fluaĵ medianoj. Eld. E. Schiltknecht, Freilagerstr. 11, Zürich 9/47, Svisujo, 1963. 11 p. 30 × 21 cm., multobligita. Kvarlingva prospekto.

Bielefeld. Eld. Trafikoficejo, Rathaus, 48 Bielefeld, Germanujo. Senpaga il. faldfolio.

Teenage Esperanto, de L. G. HARTRIDGE. Eld. la aŭtoro, Croydon, 1963. Dua eldono, 48 p. 20 × 16 cm, multobligita. Anglalingva gvidlibro por Esperanto-instruistoj en junularaj kluboj k.s.

Propraj nomoj en la Nova Testamento, de H. G. WANNEMAKERS, S. J. Eld Internacia Katolika Informejo, Tilburg, 1963. 30 p. 21 × 14 cm. Serio de I.K.I. n-ro 2.

Duonvoĉe, poemaro de G. E. MAURA. Dua eld. Stafeto, La Laguna, 1963. 180 p. 19 × 12 cm, kun 3 desegnaĵoj. Serio Beletraj Kajeroj n-ro 19. Prezo: 5,70 gld. (22,8 st).

Homoj sur la tero, romano de Stellan ENGHOLM. Dua eld. Stafeto, La Laguna 1963. 236 p. 23 × 17 cm., plus 4 bildopaĝoj. Belliteratura serio n-ro 21. Prezoj: bind. 10,65 gld (42,6 st); broŝ. 7,60 gld (30,4 st).

Tierkalender 1964 (Bestkalendaro 1964), eld. Reinsteg-Verlag. 7261 Gechingen über Calw. Germanujo. 12 p. 42 × 30 cm., kun kolorbildoj de bestpentraĵoj kaj ampleksa teksto germana kaj Esperanta. Eldonnumero 35.000, senpage distribuata i.a. al du trionoj de ĉiuj germanaj lernejoj. Eldono 1965 mendebla ĝis septembro 1964 ĉe la eldonisto. Prezo por 1965: 13 steloj afrankite.

Moderna Pekino, fotolibro kompilita de la Oficejo por Planado de Urba Konstruado de Pekino. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1963. 112 p. 24 × 26 cm, bind. Kun multaj koloraj fotoj. Prezo: 5,30 gld.

Podręcznik Języka Esperanto (lernolibro de Esperanto) de Mieczysław SYGNARSKI. Eld. Wiedza Powszechna, Warszawa, 1963. 377 p. 20 × 14 cm. Prezo: 5,— gld (20 st).

ricevitaj eldonaĵoj

LAŬLANDE

Afriko

- Vojaĝante en oktobro en Nigerio kaj Etiopio, vicprezidanto de UEA S-ro E. L. M. Wensing diskutis en pluraj universitatoj kaj ministerioj la Internacian Lingvon.

Francujo

- En "Le Figaro", unu el la plej eminentaj ĵurnaloj de Eŭropo, aperis je 28.11.63, en ligo kun raporto pri scienca konferenco ĉe UNESKO, pledo de la scienca redaktoro de "Le Figaro" por flankenlaso de nacia fiero kaj por adopto de Esperanto.


Hindujo

- Jus aperis en Kalikato 70-paĝa broŝuro en bengala lingvo pri Esperanto, verkita de S-ro L. Sinha ("Esperanto" 1963/95). La verko estas la unua eldonaĵo pri Esperanto en iu ajn lingvo de Hindujo. Por fondo de Bengala Esperanto-Instituto estas ricevitaj 1000 rupioj (3000 steloj) kaj por ĝia biblioteko 45 libroj. Adreso por donacoj: S-ro L. Sinha, Vinaya-Bhavana, P.O. Santiniketan, W. Bengal, Hindujo.

Hungarujo

- Komenciĝis kurso en la jura fakultato de la Budapeŝta Universitato. Kurson komencis ankaŭ la pedagoga sindikato.

Indonezio



- En Jogjakarta ekspozicion aranĝis membroj de la Islama Esperantista Klubo, Indonezia Esperanto-Asocio, k.a.

Pollando

- Sub aŭspicio de konata ĵurnalo okazos ekspozicio "Infanoj de la Mondo" ĉe la Ŝtata Infandomo en Gdańsk-9, str. Brzegi 55. Ĉiujn sendaĵojn ligitajn kun la ekspozicia temo kvitancos il. poŝtkarto.

LAŬFAKE

Filatelo

- Speciala poŝtmarko honoros la 100-jaran datrevenon de finna filologo E. N. Setälä, apoginto de Esperanto. Unuataga koverto kun Esperanta teksto estas mendebla ĝis 20.2.63 ĉe Filatela Sekcio, Postihällitus, Helsinki, Finnlando. Prezo: 0,55 mk aŭ 2 rpk.

Instruistoj

- Por nova rubriko "Infanoj de la mondo skribas por vi" en la jugoslavia porinfana gazeto "Kekec", S-ro T. Sekelj, Studentski trg 10, Beograd, bezonas verkaĵojn kaj desegnaĵojn de ĉiulandaj infanoj de 5- ĝis 14-jaraj. Li povas kompensi per libroj aŭ jugoslavaj infandesegnaĵoj.

Leksikografio

- La plej detala bildvortaro de la mondo, de Duden, kiu bilde klarigas ĉ. 25.000 nociojn, jam aperis en eldonoj germana, angla, franca, kaj hispana. Nun ĝi aperos ankaŭ en la Internacia Lingvo ĉe Esperanto-Press (Oakville, Ontario, Kanado). Tiucele la eldonontoj alvokas al kunlaboro ĉiun Esperantistan fakulon, kiu konas la lingvon de unu el la jamaj eldonoj.

Radio

- La ĝenerala sekretario de KAROSI, katolika laika organizaĵo en Nederlando, proponas al ĝia estraro aldonon de Esperantaj elsendoj al la programo de nova katolika stacio stariĝota en Liberio, okcidenta Afriko.
- Radio Petöfi, Budapeŝt, Hungarujo, dissendas hungarlingvajn informojn pri Esperanto. Skribu, petante dissendojn en Esperanto por alilandanoj.

Sporto

- "Internacian Esperantistan Sport-Ligon" deziras fondi la Hungara Esperanto-Asocio (Budapeŝt V, Petöfi u. 17). La en Hungarujo eldonata "Internacia Jarlibro pri Naĝado" ekde 1962 uzas Esperanton inter aliaj lingvoj.

Scienco

- La scienca kaj teknika rondo de "Grajnoj en Vento" (Alberto Barrocas, Yaguari 2248, Ap. 3, Montevideo, Urugvajo) akiris aŭspiciojn de universitatoj en Argentino, Japanujo, Nederlando kaj Urugvajo. La dua kajero ampleksas la kampojn de medicino, kemio, inĝenierado kaj elektrotekniko.

mallongaj novaĵoj

**esperanto
januaro
1964**



50-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Tokio, 31 julio—7 aŭgusto 1965

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 1 Rotterdam, la 12-an de decembro 1963

Aliĝkotizoj

Kongresano	45.—	ned. gld.	(180 st.)
Edz(in)o	22.50	„ „	(90 st.)
Junulo ĝis			
20 jaroj	17.—	„ „	(68 st.)
Universitata Studento			
ĝis 30 jaroj	28.—	„ „	(112 st.)
Blindulo	22.50	„ „	(90 st.)

La limdato por aliĝo laŭ la supraj kotizoj estas prokrastita ĝis la 31-a de julio 1964. Ĝis tiu dato estas akceptataj nur aliĝoj pagitaj rekte al la konstanta adreso de la Kongreso aŭ al la oficialaj Kongresaj Perantoj.

Aliĝoj el Japanujo ĝis la menciita dato estas akceptataj nur se pagitaj al la konstanta adreso de la Kongreso. Ekde 1.8.1964 por japanoj estos eble pagi en japana mono.

Flugkaravano.

Detalaj informoj pri la karavano al Tokio organizata de U.E.A. estas troveblaj en la decembra numero 1963 de la revuo "Esperanto" (paĝo 222).

Statistiko (ĝis 11-12-1963).

Argentino 1, Aŭstralio 5, Aŭstrujo 6, Bahamaj Insuloj 2, Belgujo 5, Brazilo 2, Britujo 15, Bulgarujo 5, Centra Afrika Respubliko 1, Danlando 8, Finnlando 4, Francujo 28, Germanujo 17, Hispanujo 3, Hong-Kongo 2, Hungarujo 4, Svedujo 9, Israelo 1, Italujo 5, Japanujo 13, Jugoslavio 7, Maroko 2, Monako 2, Nederlando 19, Norvegujo 2, Nov-Zelando 3, Pollando 6, Svisujo 3, Unuiĝinta Araba Respubliko 1, Urugvajo 1, Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko 15, Venezuelo 3. Entute 200 el 32 landoj.



49-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Den Haag, 1—8 Aŭgusto 1964

Sub la Alta Protektado de Sia Moŝto Juliana, Reĝino de Nederlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 4 Rotterdam, la 23-an de nov. 1963

Novaj Kotizoj.

Ekde la 1-a de januaro 1964 validas jenaj novaj kotizoj:

Kongresano	50.—	ned. gld.	(200 st.)
Edz(in)o	25.—	„ „	(100 st.)
Junulo	19.—	„ „	(76 st.)
Studento	31.—	„ „	(124 st.)
Blindulo	25.—	„ „	(100 st.)

Netraktitaj aliĝoj.

Ĉe la administracio de la Kongreso troviĝas pluraj aliĝiloj netraktitaj pro la absolute nelegeblaj nomoj sur ili. Por eviti tion ni varme konsilas al ĉiu aliĝonto kiel eble plej klare (prefere tajpe aŭ preslitere) skribi sian nomon kaj adreson.

Foto-konkurso.

En kunlaboro kun la 20-a Internacia Junulara Kongreso kaj kun la firmo Gevaert, la 49-a U.K. okazigos Internacian Foto-Konkurson. La temo de la konkurso estas el la konata "Taglibro de Anne Frank": "Letero 15/6/1944 — Freneze mi amas la naturon, ĉu nur pro tio ke dum longa tempo mi ne povis elŝovi la nazon eksteren?". Por la gajnintoj de la konkurso estas antaŭviditaj pluraj premioj, i.a. foto-aparato.

En venontaj komunikoj aperos pli detalaj informoj kaj regularo.

Karavanoj.

Anoncis karavanon: I.E.F., S-ro G. Grattapaglia, Via Pallanza 32, Torino, Italujo kaj

S-ro S. K. Nielsen, Havepladsvej 129, Fredericia, Danlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 5 Rotterdam, la 12-an de decembro 1963

Honora Komitato.

Akceptis eniri en la Honoran Komitaton de la 49-a U.K. Mag. Th. H. Bot, Ministro pri Instruado, Arto kaj Scienco; D-ro W. Drees Honora Ministro; Barono F. X. van der Straeten Waillet, Dojeno de la Ambasadoroj en Nederlando; Mag. J. A. Jonkman, Prezidanto de la Unua Ĉambro de la Parlamento; Mag. F. J. F. M. van Thiel, Prezidanto de la Dua Ĉambro de la Parlamento; Mag. J. Klaasesz, Prefekto de la Provinco de Sud-Holando; Mag. H. A. M. T. Kolfshoten, Urbestro de Den Haag; Mag. G. E. van Walsum, Urbestro de Rotterdam; Prof. D-ro C. J. Gorter, Prezidanto de la Reĝa Nederlanda Akademio de Sciencoj; Prof. D-ro de Vries, Rektoro de la Instituto por Sociaj Studoj.

Petoj por helpo.

La membroj de la Loka Kongresa Komitato kaj multaj aliaj esperantistoj, kies nomoj troviĝas en la Kongresa Libro de la 48-a U.K., daŭre ricevas petojn de nekonataj personoj, por ke oni pagu la aliĝkotizon al la 49-a U.K. kaj eĉ la restad- kaj vojaĝkostojn. Ni bone komprenas la situacion de la petantoj kaj bedaŭras pro tio, sed ni devas atentigi ke oni ne rajtas uzi la nomliston en la Kongresa Libro por sendi petojn aŭ iamaniere ĝeni personojn. La ricevantoj de tiaj leteroj estas liberaj ne doni respondon.

Samtempe ni atentigas ke invitleteroj por la 49-a U.K. estas senditaj nur al pagintoj de la kongreskotizo.

Fakaj Kunvenoj. Anoncis fakan kunvenon dum la 49-a U.K.: Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista; Universala Ligo; Internacia Geo-

LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
Ivo Osibov, Splitskog odreda 15, SPLIT, Jugo-
slavio.**

EL LA LANDAJ SEKCIOJ

— **Britujo** Informa fako de Junularo Esperantista Brita eldonis novan informfolion en la angla lingvo por vasta uzado ĉe angle parolantaj universitatoj. La folio estas rezulto de pasintjara eksperimento per iom simila folio ĉe la Universitato de Cambridge, kie montriĝis, ke ĝi taŭge kontribuis al la ĝenerala informado pri Esperanto inter la studentoj kaj provizis utilan bazan scion por kursontoj. Ĉiuj kiuj povas utiligi la informfolion povas mendi bezonatan kvanton ĉe S-ro James A. Franklin, Emmanuel College, Cambridge, senpage, kvankam donacoj por helpi rilate la koston estos bovenaj. Tiu ĉi iniciato certe estos taŭga kontribuo al la pliintensigo de informado kaj agado dum la Jaro de la Junularo. (Informis D. Charters).

— **Francujo** Debatoj pri la Internacia Lingvo okazis ĉe du junularaj asocioj de Roubaix. Unuan kunsidon partoprenis gasto el Ĉeĥoslovakujo D. Kočvara, junulara delegito el Ostrava.

Libropremioj rekompencos la laŭreatojn de la konkurso de "Nord-Esperanto". La temoj estas: "La plej bona libro kiun mi legis en Esperanto" aŭ "Miaj ferioj en Esperantujo". Sendu ĉirkaŭ centlinian tekston antaŭ la 1-a de Marto 1964 al: Esperanto, 7 Rue Saint Saëns, Wattrelos (Nord) Francujo. (L. Giloteaux).

— **Hispanujo** La komisiito por Informa Fako de la Hispana Esperanto-Junulara Sekcio, f-ino M. Teresa Magría eldonas informilon

grafa Asocio; Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj; Sendependa Ordeno de Odd-Fellow; Veterana Esperantista Klubo; Rotaria Klubo; Universala Medicina Esperanto-Asocio; Esperanta Sak-Ligo; Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio; Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj Esperantistaj; Studenta Tutmonda Esperantista Ligo; Tutmonda Esperantista Junulara Organizo; Martinus-Instituto; Internacia Ligo de Esperantistaj Filmistoj; Internacia Asocio de Esperantistaj Eldonistoj. Statistiko (ĝis 11-12-1963).

Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 8, Belgujo 7, Brazilo 2, Britujo 32, Bulgarujo 276, Ĉeĥoslovakujo 6, Danlando 16, Finnlando 5, Francujo 81, Germanujo 46, Hispanujo 2, Hungarujo 56, Israelo 2, Italujo 6, Japanujo 5, Jugoslavio 42, Kuvajto 1, Madagaskaro 1, Monako 5, Nederlando 106, Norvegujo 3, Nov-Zelando 1, Pollando 90, Sovetunio 1, Svedujo 17, Svisujo 2, Usono 3. Entute 824 el 28 landoj (pasintjare 200 el 27 landoj).

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

kun novaĵoj pri Esperanto kaj dissendas ĝin al ĉiuj hispanaj radiostacioj kaj ĵurnaloj. Rezulte de ŝia laboro multaj el la informoj de ŝi senditaj aperis en pluraj plej gravaj kaj altnivelaj ĵurnaloj kaj revuoj de Hispanujo, ekzemple: A.B.C., Vanguardia, Sur, ktp. Same multaj radiostacioj dissendis la informojn. (HEJS-bulteno)



la juna vivo

— **Madagaskaro** La 19-an de Oktobro la junaj membroj de EAM okazigis ĝeneralan kunvenon en la Komerca Ĉambro de Tananarivo. Ĉeestis la kunvenon pli ol 30 personoj inter kiuj troviĝis nemembroj sed kiuj iĝos membroj tre certe. Estis antaŭviditaj en la tagordo la nomŝanĝo kaj la oficialigo de la sekcio laŭleĝe. El ĉiuj proponitaj nomoj estas elektita JEO/M (Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro). Tuj poste la membroj pridiskutis kaj unuanime akceptis la statutprojekton, kiu estas kompilita laŭ tiu de TEJO kaj iom modifita. Fine la ĉeestintoj elektis la Estraron, kiu konsistas el prezidanto Randrianasolo, vicprezidanto R. Randrianekena, sekretario E. Raveloson kaj kasisto J. Rasolofonirina. (Informis E. Raveloson).



Somera kunsido de klubo en Ikuno-Altlernejo, Osaka, Japanujo

En Hungarujo fondiĝos TEJO-Sekcio

En la lastaj tagoj de Septembro kunvenis la junaj funkciuloj de la Hungara Esperanto-Asocio en Budapeŝto por pritrakti siajn problemojn kaj taskojn por la fondo de la TEJO-Sekcio de Hungarujo. Jozefo Rieth, la junulara gvidanto de HEA salutis la ĉeestantojn de la kunveno. Ludoviko Kapitány, la ĉefsekretario de HEA parolis pri la organizaj taskoj por starigi la TEJO-Sekcion en Hungarujo. Oni elektis Preparkomitaton, kiu konsistas el 8 anoj.

La elektita Preparkomitato faros la organizajn laborojn, ĉiumonate unufoje ĝi kunvenas. La TEJO-Sekcio fondiĝos la 15-an de Decembro 1963 en Budapeŝto.

D-ro Imre Ferenczy

esperanto
januaro
1964

**esperanto
en radio**

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu "Esperanto" 1963, p. 117 (junio). Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 200m. (1502 kcs), 50.42m. (5950 kcs), 48.90m. (6135 kcs), 42.11 m. (7125 kcs), 41.99m. (7145 kcs), 49.18m. (7285 kcs), 31.45m. (9540 kcs), 31.01m. (9675 kcs), P. Esperantaj disaŭdigoj, Pola Radio, Warszawa.
Dimanĉo	19.00-19.25	Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 39.11m. (7670 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	23.30-23.55	Sofia, 31.38m. (9560 kcs), 25.32m. (11850 kcs). P.
Lundo	12.10-12.20	Bern, 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 13.94m. (21520 kcs). (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C., Giacomettistr. 1, Bern, Svislando.
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs). P., N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	15.00-15.15	Valladolid, 203m. (1475 kcs), K.I. Radio Valladolid, Hispanujo.
	16.50-17.00	Wien, 577m. (520 kcs). 514m. (584 kcs). 293m. (1025 kcs). 25.45m. (11785). P. Radio Wien Argentinierstr. 30 a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m. (5960 kcs), 41.24m. (7270 kcs), 30.90m. (9710 kcs). P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	11.00-11.30	Pjongjang, 360m. (820 kcs), 286m. (1050 kcs), 278m. (1080 kcs), 48.00m. (6250 kcs), I.P. Centra Radio-Komitato, Pjongjang, Norda Koreujo.
	12.10-12.20	Bern. Kiel lunde, (S-ro C. Gacond).
	17.45-18.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m. (5990 kcs), 30.71m. (9770 kcs), 25.10m. (11.950 kcs), 16.78m. (17.880 kcs). K. I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	18.45-19.00	Resende, 1961m. (153 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
	20.00-20.30	Guatemala, 220m. (1360 kcs), 48.54m. (6180 kcs), 30.75m. (9760 kcs). I.K. Radio Nacional T. G. W., Guatemala Cd. Mez-ameriko.
Ĵaŭdo	06.00-06.15	Gdańsk, 230m. (1303 kcs). I.K. Pola Radio, ul Uphagena 1. Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando.
	17.45-18.00	Praha, 233m. (1286 kcs). I. Radio Praha, Disaŭdigoj por Aŭstrujo, Praha, Ĉeĥoslovakujo (nur la lastan ĵaŭdon de la monato).
	20.30-20.45	Volta Redonda, 1560m. (192 kcs). P. Radio Siderurgica Nacional ZYP 26, Volta Redonda (Rio de Janeiro), Brazilo.
	21.15-21.25	Bern 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 31.07m. (6955 kcs), 25.61m. (11715 kcs). P. (D-ro A. Baur).
	23.05-23.30	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.00-23.10	Valencia, 193m. (1554 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Vendredo	10.00-11.10	Praha, 49m., 41m., 31m. I (Ripeto de la ĵaŭda rubriko la morgaŭan vendredon; dekkvinminuta parolado dum germanlingva programo).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.00-22.10	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs), P., V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
Sabato	9.45-10.0	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto Av. Almirante Barosso 81, Rio de Janeiro, Brazilo.
	19.00-19.15	Teresina, 259m. (1160 kcs), 62.56m. (4795 kcs). P. Radio Pioneira de Teresina, Rua Teodoro Pacheco 1179, Teresina, (Piauí). Brazilo.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaŭde. (S-ro C. Gacond).

Radio Roma. 3-I, Inter Novjaro kaj Epifanio; 7-I, Tra la literaturo; 10-I, Ettore Romagnoli 25 jarojn post la morto; 14-I, Novaĵoj el Italujo; 17-I, Capri; 21-I, Italaj kanzonoj en Esperanto; 24-I, Italaj operkantistinoj: B. kaj C. Marchisio; 28-I, Leterkesto; 31-I, Italaj humanistoj: Lorenzo il Magnifico. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja (marde kaj merkrede) kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella (vendrede).

**memoriga
kalendario**

Januaro
13-19 Brazila Kongreso Fortaleza
Marto
30-5/4 Kultura semajno Grésillon
31 UK-kotizoj Hago plialtiĝos
Aprilo
30 Limdato Int. Ekzameno (p. 202)
Majo
9-15 IFEF-Kongreso en Bruselo
15-18 Brita Kongreso en Bridlington
16-18 Germana Kongreso en Soltaŭ
Franca Kongreso en Parizo

Belga Kongreso en Liège
31 Limdato Belartaj Konk. (p. 173, 222)
Junio
30 Limdato aliĝo 49-a U.K. Hago
Julio
2 Sezono Grésillon komenciĝas
3-5 Usona Kongreso en Nov-Jorko
23-28 Hispana Kongreso en Valencia
23-29 IKUE-Kongreso en Valencia
25-31 SAT-Kongreso en Narbonne
25-1/8 KELI-Kongreso, Lunteren, Nederl.
30-1/8 Antaŭkongreso en Bruselo (p. 216)

**esperanto
januaro**

Distingoj

KALOCSAY. D-ro Kálmán Kalocsay, la konata verkisto, akademiano kaj nuntempe ĉefkunlaboranto de "Hungara Vivo", ricevis la titolon de Universitata Profesoro. Oni esperas baldaŭ reeldoni liajn poemtradukojn el Petöfi kaj la tradukon de "Tragedio de l' Homo" de Madách.

MINNAJA. Kun plezuro ni eksciis, ke Carlo Minnaja, denaska Esperantisto kaj nun ĝenerala sekretario de TEJO, brile doktoriĝis pri matematiko en la Universitato de Pisa.

Jubileoj

STØP-BOWITZ. 50-jara fariĝis lektoro C. Støp-Bowitz, prezidanto de Norvega Esperantista Ligo, vicprezidanto de ISAE, Akademiano, Komitatano de UEA.

ELEKTO DE KOMITATANOJ B SPECIALA ATENTIGO AL ĈEFDELEGITOJ KAJ DELEGITOJ

Kiel menciite en Septembro, la jaro 1964 estas la jaro de la elektoj de komitatanoj B. Ilia mandato komenciĝos la unuan tagon de la Universala Kongreso en Hago.

Laŭ la Statuto (art. 25 b) kaj la Ĝenerala Regularo (art. 28) je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31-a de decembro 1963 estas elektota po unu komitatano B.

Laŭ art. 28 b de la Ĝenerala Regularo, la ĉefdelegitoj kaj delegitoj per tio ĉi estas invitatitaj fari proponojn pri la kandidatoj. Kvin ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ne la vicdelegitoj aŭ fakdelegitoj) rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio. Ni atentigas, ke laŭ art. 30 de la Ĝenerala Regularo (vidu p. 145 de la septembra numero 1960 de la revuo Esperanto) kandidato devas esti membro-abonanto de UEA almenaŭ dum la lastaj tri jaroj, do minimume ekde januaro 1961. Por la bona funkciado de la asociaj laboroj estas necese elekti kiel komitatanojn personojn kiuj kutimas veni al la Universalaj Kongresoj, kiuj pretas oferi kongresajn plezurojn por sidi en kunvenoj, kiuj konas la laborojn de la Asocio (regule amplekse raportatajn en la Dua Parto de la Jarlibro) kaj ĝiajn Statuton kaj Regularojn (aperintajn en la Unua Parto de la Jarlibro 1959).

La proponoj pri la kandidatoj, kun ilia skriba konsento pri la kandidatigo kaj, se eble, kun detaloj pri iliaj persono, kvalitoj, pozicio en la movado, pozicio ekster la movado ktp., devos atingi la Centran Oficejon de UEA, *Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, plej malfrue la 31-an de marto 1964*. Proponoj, kiuj ne estos subskribitaj de 5 ĉefdelegitoj aŭ delegitoj, aŭ kiuj ne enhavos la skriban konsenton de la kandidato, aŭ atingos la Centran Oficejon post la menciita dato, ne povos esti prenitaj en konsideron.

En la elektoj de komitatanoj B esprimiĝas la deziroj de la individuaj membroj de UEA. Uzu vian rajton kaj baldaŭ ensendu viajn proponojn. Nepre agu laŭ la supraj preskriboj, por ke via propono estu valida!

ŠUPICHOVÁ. La 27-an de januaro fariĝas 80-jara la konata ĉeĥa pionirino Julie Šupichová, kiu eklernis la lingvon en 1907 kaj tre abunde dum pluraj jardekoj verkadis lernolibrojn, legolibrojn, artikolojn k.s. Al niaj gratuloj kaj bondeziroj speciale aliĝas ĉiuj ĉeĥaj Esperantistinoj.

SAKOWICZ. La 13-an de novembro fariĝis 75-jara S-ro Roman Sakowicz, lerninta Esperanton en 1904 kaj ankoraŭ nun ĉefdelegito de UEA por Pollando. Varmajn gratulojn!

Retrovo de personoj

S-ro F. Jelínek en Ĉeĥoslovakujo turnis sin al la Delegito de UEA en Utrecht por trovi amikon, kun kiu li suferis en koncentejo dum milito, kaj kun kiu li perdis la kontakton antaŭ 16 jaroj. La kontakto estis en tri semajnoj reestablita...

LA UNIVERSALA KONGRESO EN 1966

Jam niaj pensoj devas flugi antaŭen, al la tempo post Tokio! La Estraro spertis, ke estas ege utile decidi pri la loko de estonta kongreso pli frue ol nur unu jaron antaŭe. Tial oni tre dezirus, se eble, jam en la printempa Estrarkunsido 1964 decidi pri la loko de la U.K. 1966. La invitoj por tiu jaro atingu la Estraron do kiel eble plej baldaŭ. Kelkaj jam estas ricevataj, sed aliaj estas ankoraŭ preparataj. Por povi konsideri ĉiujn eblecojn kaj fari la plej konvenan decidon, la Estraro devas disponi pri plej kompleta, dokumentita materialo.

Tial, en la nomo de la Estraro ni alvokas ĉiujn, kiuj estas planantaj inviti la Universalan Kongreson en 1966 al sia urbo, sendi la inviton kun ĉiuj bezonataj detaloj plej malfrue la 15-an de marto 1964.

Informojn, direktivojn, kondiĉojn ktp. volonte liveras la Centra Oficejo, *Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando*.

M. H. Vermaas, Direktorino C.O.

DELEGITOJ

Aŭstralio

Ballarat (Victoria) 50.000

JD: F-ino Jennifer Clack, muzik-instruistino, 52 A Webster St; tel. 22 612.

FD (Turismo): S-ro Jim Dimo, muziklernejestro, Box 340, 602 Lydiard St. Nth.; tel. 24019

FD (Komerco): la FD (Turismo)

FD (Korespondado): la FD (Turismo)

Coffs Harbour (New South Wales) 10.000

FD (Ornitologio): F-ino Grace Kirkwood, gimnazio-instruistino, Box 78 P.O. Coffs Harbour Jetty; tel. 206

Aŭstrujo

ĈEFDELEGITO: S-ro F. W. Rentmeister, Mariahilferstr. 206, Wien XV/101; tel. 73 25 21 (221).

Belgujo

Antwerpen FD (Fotografio): vakas

Bulgarujo

Svišov D: vakas.

FD (Ekonomia Geografio) vakas

esperantista
vivo

oficiala
informilo
n-ro 364
1 dec. 1963

esperanto
januaro
1964 17

Finnlando

Karjaa (Uudenmaan lääni) 4.800
D: S-ro Juhani Vilkki, instruisto, Alingsås 22

Francujo

Paris FD (Fervojistoj): vakas

Germanujo

Flensburg D: vakas
Schwelm (Nordrhein-Westfalen) 30.000
D: S-ro Anton Kronshage, administra inspektoro, Eulenweg 5
FD (sociala asekuro por malsanuloj): la D.
Wuppertal (Nordrhein-Westfalen)
FD (sociala asekuro por malsanuloj): vakas

Italujo

Azzano (Udine) 10.000
FD (Instruado): S-ro Silvano Manias, instruisto, Don Bosco strato n. 12; tel. 64046
Ghilarza (Cagliari) 4.000
D: F-ino Angela Delogu, instruistino, Via Regina Margherita 11
VD: Luigia Sias, instruistino, Corso Umberto I° no. 77; tel. 5002
FD (Filatelo): la VD
FD (Folkloro): la D

Milano 1.600.000
D: D-ro Nicola Minnaja, fizikisto, Via Domenichino 1; tel. 430.351

Japanujo

Itami (Hyôgo-ken) D: vakas
Toyonaka (Osaka-hu)
D: D-ro Kôzô Ueda, konsilanto de farmacia kompanio, Miyayama-cho 3-59; tel. (2)-5921

Jugoslavio

Beograd (Srbija) 800.000
FD (Aplikita arto): S-ino Milosava Smiljanić librotenistino, Vojvode Milenka 28/III
FD (Bibliotekaj Aferoj): S-ino Olga Djukić, bibliotekistino, ul. Skadarska br. 6/II

Petrinja (Hrvatska) 10.000
D: S-ino Maria Horžinek, instruistino, Arhova 8
FD (Instruado): la D.

Požarevac (Serbio) 25.000
FD (Filatelo): S-ro Jovan Ratković, veterinario, ul. Bože Dimitrijevića 18

Zagreb (Hrvatska) 500.000
FD (Arkeologio): S-ro Marinko Gjivoje, referanto por Informado kaj Dokumentado en Fervojdirekcio, Mihanovićevea 12; tel. 39-032 (ĉambra 355)

Kanado

Montreal (Quebec)
FD (Urba-arkitekturo): vakas

Nederlando

Amsterdam FD (Instruado): vakas
Ede (Gelderland) 60.000
FD (Evangelia Kristanismo): F-ino Tini Putto, instruistino, Bennekomseweg 20; tel. 08380-9223

Nijmegen (Gelderland) 135.000
FD (Turismo): S-ino G. H. M. Wulfers-Meddens, eks-instruistino, Lindanusstr. 16; tel. 51505

Pollando

Warszawa 1.200.000
JD: Marian Dobrzyński, studento de psikologio, ul. Grochowska 142/2, Warszawa 44; tel. 10-46-71

Rumanujo

Bucuresti 1.400.000
D: S-ro Alexandru Tausciuc, studento, str. Dr. Istrate N-ro 12, Bukurešto 28
FD (Geografio): la D
FD (Studentaj Aferoj): la D

Sovetunio

Leningrad 4.000.000
VD: S-ro Oskar Gardi, ĵurnalisto, str. Skolnaja 2 kv. 18, Leningrad — P — 183; tel. 33-74-56
FD (Ĵurnalismo): la VD

Svedujo

Ånge D: vakas
FD (Poŝto): vakas
Karlskrona JD: vakas
Norrköping (Östergötland) ĉ. 90.000
D: S-ino Eivor Bergström, Östra Station; tel. 24535
VD: Sven Samelius, fotografisto, Drottninggatan 60; tel. 84172
Sundsvall (Medelpad) 30.000
JD: F-ino Ingrid Carlsson, malsanflegistino, lernantino, Sjuksköterskeskolan; tel. 113109

Svislando

Basel 228.000
FD (Korespondado): S-ro Béla Serfözö, magazenisto, Leimenstr. 31; tel. (061) 23-86-33

La Internaciaj Konkursoj 1963

Stato je la 30-a de novembro

Konkurso I

	Lando	kvoto	poentoj	%
1.	Finnlando	2570	2990	116,34
2.	Japanujo	3240	3640	112,35
3.	Nederlando	5068	5575	110,00
4.	Svedujo	6640	7130	107,38
5.	Francujo	7225	7636	105,69
6.	Danlando	2936	3099	105,55
7.	Usono	4110	4315	104,99
8.	Jugoslavio	5180	5340	103,09
9.	Britujo	6368	6536	102,64
10.	Svislando	2141	2165	101,12
11.	Italujo	4220	4200	99,53
12.	Germanujo	7221	6936	96,05
13.	Brazilo	3856	3684	95,54
14.	Hispanujo	2696	2560	94,96
15.	Belgujo	1695	1555	91,74
16.	Norvegujo	1755	1605	91,45

Konkurso II

1.	Nov-Zelando	1167	1431	122,62
2.	Aŭstralio	1233	1425	115,57
3.	Kanado	769	837	108,84
4.	Israelo	460	460	100,00
5.	Aŭstrujo	1475	1420	96,27
6.	Madagaskaro	250	236	94,40
7.	Portugalujo	515	485	94,17
8.	Argentino	905	810	89,50
9.	Islando	250	215	86,00
10.	Urugvajo	250	135	54,00
11.	Sudafriko	250	125	50,00

Vidu la regulojn sur paĝo 26 (Febr. 1963)

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brems, F-ino A., Soestdijk, Nederlando.
Brya, S-ro A. M., Urbana, Usono.
Criach, S-ro Antonio, Sabadell, Hispanujo.
Hall-Smith, Capt. D., London.
Kingham, F-ino Ann, South Shields, Britujo.
Kronshage S-ro Anton, Wuppertal, Germanujo.
Mabesoone-Visser, S-ino S. C., Amsterdam, Nederlando.
Moisley, S-ino Mary C., Powell River, Kanado.
Oosthoek, F-ino P. Rotterdam, Nederlando.
Salt, F-ino Betty, Calgary, Kanado.
Dekker, F-ino W. den, Rotterdam;
Hoesbergen, F-ino M., Rotterdam;
Wulfers, S-ro L. J., Nijmegen;
Slot, S-ro R., Zeist, Nederlando.

MEMBRO-SUBTENANTO 1963

476 Bernhardt, S-ro Werner, Honiara, Britaj Solomonaj Insuloj.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964

1. Belhoste, S-ro L., Fontenay; 2. Bernard, S-ro R., Bois-Colombes; 3. Ploussu, S-ro A., Grenoble, Francujo; 4. Pešič, S-ro Milan, Beli Manastir, Jugoslavio; 5. Clark, D-ro K. A., Edmonton; 6. Clark, F-ino M. A., Calgary; 7. Henderson, S-ino Dorothy, King; 8. Lewis,

S-ro H. J., Halifax, Kanado; 9. Baaten, S-ro W., Utrecht; 10. van Dijk, S-ro J. P., Oosterland; 11. Kroon-Rentinck, S-ino J., Eemnes; 12. Laverman, F-ino A. A., Leeuwarden; 13. Vries, S-ro J. de, Leeuwarden, Nederlando; 14. Bernhardt, S-ro W., Honiara, Britaj Solomonaj Insuloj; 15. Dickson, S-ino Margaret E., Cape Town, Sudafriko; 16. Ammann, S-ro Karl, Solothurn; 17. De Sassi, S-ro M., Zürich, Svislando.

FONDAJO PROF. CANUTO

Prof. I. Lapenna 5 MA 1964, Britujo.

Ĉiu kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj honore al la nobla prezidinto de UEA.
(Vidu 1960, p. 105).

LA POŝTMARKKOLEKTADO

La artikolo en oktobro portis rezulton. Alvenis tiom da poŝtmarkoj, ke tre verŝajne 1963 donos la ĝis nun plej altan sumon. Dankon al la kontribuintoj. Mi memorigas, ke estas tro granda laboro, kaj elspezo, respondi al regulaj sendantoj ĉiun fojon. Ekonomia rezultato kaj nomoj de la kvin premiitoj por 1963 aperos en la februara numero.

Akceptas daŭre ĉiajn poŝtmarkojn
P. Zacho, Slotsherrensvej 218, Vanløse, Kopenhago, Danlando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA (adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo) kiu peras adresojn laŭ la regularo aperinta en Jarlibro 1963-a.

Informojn pri la katolika religio oni povas senpage ricevi de la Internacia Katolika Informejo, Sekretariejo: Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Adressaĝo: nia vic-delegito en Milano (Italujo) translokiĝis de via A. Saffi 20 en Via Prospero Finzi 15, Milano (915). La telefonnumero estas 25.76.577.

Maranata. Kio estas tio? Ĉu Jesuo hodiaŭ aŭskultas preĝon? Ĉu Li respondas? Ĉu mi ricevos respondon? Skribu al S-ro Liljengordo adreso: Älvsjövägen 33, Älvsjö, Svedujo.

F-ino Marta L. Goñi, Gustavo Gallinal 2348, Montevideo, Urugvajo. — Interŝ. registrite pk kaj pm nur kun Ameriko.

F-ino Irene Zeballos, Fray Marcos, Urugvajo. — Interŝ. kun ĉ.l. registrite nur cigared-etikedojn.

La Ideala Nutraĵo. En tiu libro estas montrite, ke la homa nutromaniero evoluas en direkto al malpli da mortigado kaj pli da humaneco. (95 paĝoj. Formato 13 × 19 cm. Fortika verda tolkovrilo kun ora surpriso. Prezo 6,50 d.kr.). Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F. Danlando.

Nova Realismo. En orienta Kent, fronte al Francujo kaj Flandrujo, troviĝas (inkluzive de

15 varbitaj de unu persono) 57 esperantistoj, el kiuj 18 kapablas sin komprenigi. Laŭ sama proporcio, nombro de parolantoj en la mondo estus maksimume 160,000, plej probable nur 50.000. "Esperantismo devas esti movado ne nur societa, sed socia". Venu ekloĝi Dovron. **Esperantistoj,** kiuj partoprenos la internacian kongreson de aktuaroj en Londono, bonvolu kontakti S-ron Peter Basten, 66, Portsmouth Road, Surbiton, Anglujo.

Deziras interŝanĝi neuzitajn poŝtmarkojn (floro, faŭno, kosmo) kun filatelistoj de tuta mondo. Jovan Ratkovič, B. Dimitrijevića 18, Požarevac, Jugoslavio.

14 komencantoj 15- ĝis 65-jaraj, diversprofesiaj deziras tutmonde korespondi per bildkartoj kaj leteroj. Krome 30 gegimnazianoj de rapidkurso atendas filatelajn bildkartojn el tutmondo por povi ekkorespondi. Skribu al: Esperantokurso, Dr. Vahle-Str. 23, 3558 Frankenberg (Nordheslando) Okc. Germanujo.
S-anoj Delong, Wybraniec, Grim, 27-jaraj, "Celma" konstruoficejo, kaj fraŭlino Byczyńska, 20-jara, "Motozbyt", Cieszyn, Pollando, interŝanĝas nur bele afrankitajn belajn bildkartojn. Respondas ĉiam.

S-ro Josef Hrabec, Strachotin C. 64, Dolní Vestonice (Ĉeĥoslovakio) deziras korespondi en ĉeĥa, germana lingvoj, poste ankaŭ en Esperanto pri numismatiko.

"Juna 12-jara Brazilo Lernanto deziras ekkorespondi kun tuta mondo per belaj poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn". Adreso: Flamarion Rodrigues Vaz, Rue 15 de Novembro 226, apto 102, Niterói — Brazilo.

oficiala
informilo

anoncetoj

esperanto
januaro
1964



K R O M M E N I E

12a Internacia Esperantista

FERIO-SEMAJNO (9—17 Aŭgusto 1964)

Ni prezentos belan programon kun ekskursoj ĉiutage. La kostoj estas nur 65 Nederlandaj Guldenoj.

Informojn kaj aliĝilojn volonte sendos al Vi nia sekr-ino;

J. A. v. d. Meulen-v. Harten

Popelstraat N. 13, Krommenie (Ned.)

La limdato de aliĝo: 1a Majo 1964
(Bonvolu aldoni intern. respondkuponon)

jarabono:

8,— gld.

32 st.

KONTAKTO


**Junulara
Revuo**

RAKONTOJ de OOGAI

en kiuj Oogai montras per diversaj temoj, kontraŭ diversaj historiaj kaj geografiaj fonoj sian majstran rakontistan talenton. La japanaj etiko, homeco kaj arto vivas en ĉi tiuj paĝoj.

Tuj mendu ĝin ĉe la Centra Oficejo
Sola vendrajto ekster Japanujo: UEA.

**Filmoj
Teatro
Poezio
Noveloj
Kritiko
Arto**



Ĉu vi jam reabonis al MONDA KULTURO por 1964 ?

**Redaktoro:
D-ro Andreo
Albault**

15,— gld. (60 st.) jare

Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE)

anoncas sian novan Ĝeneralan Sekretarion:

S-RO ANDRÉ BERTIN

6, rue des Champs Blancs

Yerres (S & O)

Francujo


**Nia ilustrita revuo "Naturista Vivo", ekde nun estas
presita kaj aperas dumonate.**

Jara abono — 40 Steloj (\$ 3.00) aŭ egalvaloro.

Redaktejo ĉe s-ro Leif Heilberg

1801 Page Street, San Francisco

California 94117, Usono



PHILIPS
ESTIS
INTER
LA
UNUAJ
KIUJ
PRODUKTIS
PRAKTIKAJN
X-RADIAJN
INSTALAJOJN

Kvankam la unuaj ekipaĵoj estis krudaj, la celoj de niaj projektistoj ĉiam restis la samaj: fidindeco, efikeco kaj sekureco. Enorme progresis la industrio de post tiu komenca epoko. Philips prave fieras ĉar ĝi lanĉis tiom da gravaj novaĵoj en X-radia aparataro. La hodiaŭa produktado de Philips etendiĝas de la tre simplaj ĝis la plej rafinitaj instalaĵoj utiligantaj X-radian televidon kaj kinematografion. Ĉio ĉi naskiĝis el ideoj de homoj laborantaj sur plej diversaj kampoj de scienco kaj teknologio, kunligitaj en la Philips-organizaĵo: ekzemple en elektroniko, en la esplorado de la vitro-hemio, en fiziko kaj mekaniko. Ĉiuj kontribuis al la disvolvigo de la radiologio kaj persisteme ili daŭrigas.



PHILIPS

en la servo de la medicina mondo